



ÖSTERREICHISCHE  
NATIONALBIBLIOTHEK

700.433-A

ESP






FAKONTOR

POSTKASSE

ÖNB




+Z81917407



RAKONTOJ

PRI FEINOJ





# RAKONTOJ

PRI FEINOJ

DE

CHARLES PERRAULT

Esperantigitaj de SINJORINO SARPY

PROFESORINO APROBITA DE LA FRANCA SOCIETO  
POR LA PROPAGANDO DE ESPERANTO

LIONA GRUPO

Korektitaj de Sinjoro DOKTORO ZAMENHOF

Honora medalo de l'Turing-Klubo Franca

2, ———  
DEUXIÈME ÉDITION  
—————

PARIS

LIBRAIRIE HACHETTE ET Cie

79, Boulevard Saint-Germain


—  
1905

700.433-A.Esp.

(2)

(21), 2. Aufl.





*Mi pensas, ke mi faras agrablajon al Esperantistoj el ĉiuj landoj, prezentante al ili tradukon de l'RAKONTOJ PRI FEINOJ DE CHARLES PERRAULT.*

*Mi penis konservi ilian plaĉan naivecon al tiuj mirrakontoj kiuj amuzis en ĉiuj tempoj, per ilia simpleco kaj ilia ĉarmo, la feliĉan infanaron kaj eĉ la seriozajn gepatrojn.*

P. S.

L. forkeris de la

*Komencas de la rakonto:*

## LA BLUA-BARBO

---

Estis iam viro, kiu havis belajn urbajn kaj kamparajn domojn, multe da teleraro ora kaj argenta, meblojn broditajn kaj oritajn kaleŝojn, sed, bedaŭrinde, tiu viro havis barbon bluan. Tio malbeligis lin kaj faris lin tiel terura, ke ĉiuj virinoj kaj fraŭlinoj forigis je li. Unu el liaj najbarinoj, altrangulino, havis du filinojn perfekte belajn; li petis de ŝi la manon de unu el la du, lasante al ŝi elekton de tiu, kiun ŝi volus doni al li. Ambaŭ rifuzis kaj resendis lin unu al alia reciproke, ne povanta konsenti fariĝi edzino de viro, kiu havis bluan barbon. Krom tio li edziĝis jam kelkfoje kaj neniu sciis kion li faris el tiuj aliaj edzinoj.

Blua-Barbo por konatiĝi, alkondukis ilin kun ilia patrino kaj tri aŭ kvar el iliaj bonegaj amikinoj, kelkaj junuloj el la najbara lando en unu el siaj kampodomoj, kie oni loĝis ok tagojn. Estis tiam nur promenadoj, ĉasadoj, fiŝkaptadoj, danca-

doj, festenoj kaj manĝetoj : neniel oni dormis, oni faris malicon nokte unuj al la aliaj ; fine ĉio iris tiel bone, ke la plej juna ektrovis, ke la domestro havas barbon ne tiel bluan kiel antaŭe, kaj kontraŭe li estas tre honesta viro.

Tuj kiam oni revenis en la urbon, oni edziĝis. Post unu monato, Blua-Barbo diris al sia edzino, ke li devas fari vojaĝon provincan, pri afero grava, dum almenaŭ ses semajnoj. Li ŝin petis bone ĝoji, dum lia forestado, inviti siajn bonajn amikinojn, konduki ilin en la kamparon kaj fari ĉie bonan manĝeton :

« Jen estas, li diris al ŝi, la ŝlosiloj de la du grandaj meblujoj, jen tiu de l'telerujo kie estas la teleraro ora kaj arĝenta, ne uzata ĉiutage ; jen tiu de miaj monkestoj, tiu de miaj kasetoj, kie estas miaj diamantoj, kaj jen la ŝlosiloj de ĉiuj apartamentoj. Tiu ĉi ŝlosileto estas de l'kabineto lokita ĉe l'ekstremaĵo de la granda galerio de l'malsupra ĉambraro : malfermu ĉion, iru ĉien, sed pri tiu ĉi negranda kabineto, mi malpermesas al vi iri en ĝin ; kaj mi malpermesas tion tiamaniere, ke vi povas timi mian tutan koleron se vi ĝin malfermos. »

Ŝi promesis ĝuste observi ĉion, kion li ĵus ordonis al ŝi ; kaj li kisinte ŝin, supreniris en sian kaleŝon kaj forveturis.

La najbarinoj kaj la bonaj amikinoj ne atendis, ke ŝi sendu serĉi ilin por veni al la juna edzino,

pro la malpacienca deziro, kiun ili havis, vidi ĉiujn riĉaĵojn en ŝia domo, ne kuraĝanta veni dum la edzo estis tie, pro lia blua barbo kiu timigis ilin.

La ĉambrojn, kabinetojn, ĉiujn pli belajn unuj ol la aliaj, ili trairis tuj. Ili supreniris poste en la meblujojn, kie ili ne povis sufiĉe admiri la nombron kaj belecon de l'tapetoj, litoj, sofoj, tabletoj, tabloj kaj speguloj, kie oni sin vidis de l'piedoj ĝis la kapo, kaj kies oritaj, arĝentaj kadroj estis la plej belaj kaj plej riĉaj, kiujn oni povis vidi: ili ne ĉesis trograndigi kaj envii la feliĉon de sia amikino, kiu tamen sin ne amuzis, vidante ĉiujn tiujn riĉaĵojn, pro la deziro kiun ŝi havis, malfermi la kabineton de l'malsupra ĉambraro. Ŝia scivolo ŝin tiel premis, ke, ne konsiderante kiel malhonestajo, ke ŝi lasu sian societon, ŝi malsupreniris kaŝatan ŝtuparon; iom da tempo, ŝi haltis, pripensante la malpermeson kiun faris al ŝi ŝia edzo kaj la malfeliĉajn konsekvencojn kiuj povos okazi al ŝi se ŝi estos malobea; sed la tento fariĝis tiel forta, ke ŝi ne povis venki ĝin.

Ŝi prenis do la ŝlosileton, kaj, tremante, malfermis la pordon de l'kabineto. Unue ŝi nenion vidis, ĉar la fenestroj estis fermitaj; post kelkaj momentoj, ŝi ekvidis la plankon tute kovritan de malfluida sango en kiun speguliĝis la korpoj de kelkaj senvivaj virinoj, alligitaj laŭlonge de l'muroj; ili estis la korpoj de ĉiuj eks edzinoj de

Blua-Barbo, mortigitaj de li, unu post alia! Ŝi pensis, ke ŝi mortas de teruro, kaj la ŝlosilo de l'kabineto, ke ŝi ĵus tiris el la seruro, falis teren. Rekonsciiĝinte iom, ŝi levis la ŝlosilon, fermis la pordon kaj supreniris al sia ĉambro por ripozi, sed ŝi ne sukcesis, ĉar ŝi estis tre ekscitita. Rimarkinte ke la ŝlosilo estis makulita de sango, ŝi ĝin viŝis du aŭ tri fojojn, sed la sango ne malaperis. Ŝi lavis kaj defrotis ĝin per sablo, sed ĉiam restis la sango, ĉar la ŝlosilo estis feino kaj estis neeble purigi ĝin tute : kiam oni purigis la santon sur unu flanko, ĝi revenis sur alia.

La saman vesperon, Blua-Barbo revenis el sia vojaĝo kaj diris ke, per leteroj ricevitaĵ, li eksciis ke ĵus finiĝis, profitege por li, l'afero pro kiu li forveturis. Lia edzino faris ĉion eblan por atesti sian kontentecon pro lia rapida reveno. La tagon sekvantan li petis la ŝlosilojn, ŝi tiel tremis donante ilin, ke li senpene divenis ĉion, kio okazis : « Kial, li diris, la ŝlosilo de l'kabineto ne estas kun la aliaj? — Sendube, ŝi diris, mi ĝin lasis sur mia tablo. — Ne forgesu doni ĝin al mi, baldaŭ, diris Blua-Barbo. »

Post kelkaj prokrastoj, ŝi devis alporti la ŝlosilon. Blua-Barbo ĝin ekzamenis kaj diris : « Kial estas sango sur tiu ŝlosilo? — Mi ne scias, respondis la malfeliĉa virino, pli pala ol la morto. — Vi ne scias! diris Blua-Barbo, mi ĝin bone scias; vi volis eneri en la kabineton! Nu! sinjo-

rino, tien vi eniros kaj loĝos apud la sinjorinoj, kiujn vi vidis. »

Ŝi sin ĵetis al la piedoj de sia edzo plorante kaj petante de li pardonon, kun ĉiuj signoj de vera pento, ŝi estis tiel bela kaj malĝoja, ke ŝi estus povinta kortuŝi ŝtonegon. « Vi tuj mortos, sinjorino, li diris al ŝi, kaj tuj. — Ĉar mi devas morti, ŝi respondis, rigardante lin per okuloj plenaj je larmoj, donu al mi iom da tempo por preĝi Dion? — Mi al vi donas duonan kvaronon da horo, sed ne unu minuton plie. »

Kiam ŝi estis sola, ŝi alvokis sian fratinojn, kaj diris al ŝi : « Anno, fratino mia (ŝi estis tiel nomata), iru, mi vin petas, supren de l'turo, vi vidos ĉu miaj fratoj venas, ili promesis al mi viziti min hodiaŭ, kaj se vi vidas ilin, vi signo donu por ke ili rapidu. »

Fratino Anno iris supren de l'turo, kaj la malfeliĉa virino kriis de tempo al tempo : « Anno, fratino mia, ĉu vi vidas neniun veni? » Kaj fratino Anno respondis : « Mi vidas nenion krom la suno kiu radias kaj la herbo kiu verdas. » Tamen Blua-Barbo kun tranĉilego en mano, ekkriis per sia tuta forto : « Vi malsupreniru rapide aŭ mi supreniros! — Ankoraŭ momenton, mi vin petas », respondis lia edzino, kaj tuj ŝi dolĉe kriis : « Anno, fratino mia, ĉu vi vidas neniun veni? » Kaj fratino Anno respondis : « Mi vidas nenion krom la suno kiu radias kaj la herbo kiu



*verdas.* — Malsupreniru tuj, ekkriis Blua-Barbo, aŭ mi supreniros. — Mi venas », respondis lia edzino, kaj ankoraŭ ŝi kriis : « *Anno, fratino mia, Anno, ĉu vi vidas neniun veni?* — *Mi vidas, respondis Anno, grandan nubon da polvo kiu venas tien ĉi.* — Ĉu estas miaj fratoj ? — Ve ! ne, fratino mia, mi vidas nur aron da ŝafoj. — Ĉu, do vi ne volas malsupreniri ? ekkriis Blua-Barbo. — Ankoraŭ momenteton », respondis lia edzino, kaj denove ŝi kriis : « *Anno, fratino mia, Anno, ĉu vi vidas neniun veni?* — *Mi vidas, respondis Anno, du rajdantoj kiuj venas tien ĉi, sed ili estas ankoraŭ tre malproksime... Dio estu laŭdata ! ekkriis ŝi, ili estas miaj fratoj... Mi signodonas al ili por ke ili akceliĝu tiom, kiom ili povos.* » Blua-Barbo kriis tiel forte, ke la tuta domo tremis.


La malfeliĉa virino malsupreniris kaj falis teren surgenu al liaj piedoj, tute ploreganta, la haroj disigitaj : « Tio nenion utilas, diris Blua-Barbo, estas necese, ke vi mortu. » Tiam li prenis ŝin per la haroj, kaj li levis tranĉilegon, li sin preparis tranĉi la kapon al ŝi. La malfeliĉa virino sin turnante al li kaj rigardante lin per okuloj preskaŭ senvivaj, petegis lin, doni al ŝi alian momenton por preĝi. — « Ne, ne, diris li, rekomendu vin bone al Dio », kaj levante sian brakon...

En tiu ĉi momento, oni puŝas fortege la pordon. Blua-Barbo tuj haltis ; oni malfermis kaj du rajdantoj eniris, glavon en mano, ili kuris rekte al Blua-Barbo.

Li rekonis la du fratojn de sia edzino, la unua estis dragono, la dua mosketisto ; li ekforkuris tuj, sed la du fratoj persekutis kaj atingis lin antaŭ la perono. Ili trapikis lian korpon per la glavoj kaj mortigis lin. La malfeliĉa virino estis preskaŭ tiel malviva kiel ŝia edzo, kaj ne havis forton stariĝi por kisi siajn fratojn.

Montriĝis, ke Blua-Barbo havis nenian heredanton, tiamaniere, ke lia edzino restis mastrino de ĉiuj liaj bienoj. Ŝi uzis parton de ĝi por edzinigi sian fratinnon Annon kun juna nobelo, kiu ŝin amis de longe ; aliparte, ŝi aĉetis kapitanajn oficojn por siaj fratoj, kaj, per la resto, ŝi edziniĝis kun tre honesta viro kiu forgesigis al ŝi la malbonan tempon, kiun ŝi pasigis kun Blua-Barbo.





## LA RUGA ĈAPETO <sup>(1)</sup>

---

Estis iam en vilaĝo knabineto la plej bela kiun oni povis vidi; ŝia patrino kaj ankoraŭ pli ŝia avino amis ŝin ĝis frenezigo. Tiu ĉi bona virino farigis al ŝi ruĝan ĉapeton, kiu plibeligis ŝin tiel, ke ĉie oni vokis ŝin : *Ruĝa-Ĉapeto*.

En unu tago ŝia patrino farinte platajn kukojn, diris al ŝi : « Iru vidi kiel fartas via avino, oni diris al mi, ke ŝi estas malsana; portu al ŝi platan kukon, kaj tiun ĉi poteton da butero. » La Ruĝa-Ĉapeto foriris tuj al ŝia avino, kiu loĝis en alia vilaĝo.

Transirante arbaron, ŝi renkontis Sinjoron Lupon, kiu forte deziris manĝi ŝin sed ne kuraĝis por kelkaj arbohakistoj kiuj estis en la arbaro; li

---

(1) *Ĉapeto* — Chaperon, diminutif de *chape*, sorte d'ancien vêtement qui recouvrait aussi la tête. Chapel = couronne.

demandis ŝin kien ŝi iras. La malfeliĉa <sup>knabino</sup> infanino ne scianta la danĝeron paroli kun Lupo, diris al li : « Mi iras viziti mian avinon kaj porti al ŝi platan kukon kaj poteton da butero, kiujn mia patrino al ŝi sendas.

— Ĉu ŝi loĝas tre malproksime ? demandis la Lupo.

— Ho, jes, respondis Ruĝa-Ĉapeto, ŝi loĝas trans la muelejo kiun vi vidas tie, tie en la unua domo de l'vilaĝo.

— Bone, diris la Lupo, mi ankaŭ volas iri viziti ŝin, mi iros per tiu ĉi vojo kaj vi tra tiu alia kaj ni vidos kiu el ni alvenos plej frue. » <sup>unua</sup>

La Lupo rapide ekkuris tra la malpli longa vojo kaj la knabineto tra la pli longa, sin amuzante per kolektado de aveloj, kurado post papilioj, aŭ farado de bukedoj per floretoj, kiujn ŝi trovis.

La Lupo baldaŭ alvenis en la domon de la avino : li frapis : Tok, tok.

— Kiu estas tie ?

— Estas via nepino, la Ruĝa-Ĉapeto, diris la Lupo, falsante ĝian voĉon, kiu alportas al vi platan kukon kaj poteton da butero, kiujn mia patrino al vi sendas. » La bona avino estis en sia lito, ĉar ŝi estis malsaneta, ŝi kriis : « <sup>nur</sup> Detiru la <sup>al</sup> bobeneton de la ligna najleto, kaj la pordo malfermiĝos. »

La Lupo detiris la bobeneton kaj la pordo

malfermiĝis, li sin ĵetis sur la bonan avinon kaj manĝis ŝin rapidege : ĉar de tri tagoj, li nenion manĝis.

Poste li fermis la pordon kaj kuŝiĝis en la liton de la avino, atendente la Ruĝa-Ĉapeton, kiu, post kelkaj momentoj, frapis la pordon : Tok, tok.

— Kiu estas tie ?

La Ruĝa-Ĉapeto aŭdante la raŭkan voĉon de l'Lupo, unue ektimis, sed pensante, ke ŝia avino malvarmumis, ŝi respondis :

— Estas via nepino, la Ruĝa-Ĉapeto, kiu alportas al vi platan kukon kaj poteton da butero, kiujn mia patrino al vi sendas.

— Detiru la bobeneton de la ligna najleto, kaj la pordo malfermiĝos.

La Ruĝa-Ĉapeto detiris la bobeneton kaj la pordo malfermiĝis.

La Lupo vidante ŝin eniri, diris, kaŝante sin en la liton, sub la kovrilon :

— Metu la platan kukon kaj la poteton da butero sur la pankeston kaj tuj kuŝiĝu apud mi.

La Ruĝa-Ĉapeto ŝin senvestigis kaj metis en la liton, kie ŝi miregis vidante kiel ŝia avino estas kiam ŝi estas senvestigita.

Ŝi diris :

— Ho, avino mia ! kiel grandajn brakojn vi havas !

— Tio estas por ĉirkaŭpreni vin pli bone, filino mia.

— Ho, avino mia ! kiel grandajn krurojn vi havas !

— Tio estas por kuri pli bone, infanino mia.

— Ho, avino mia ! kiel grandajn okulojn vi havas !

— Tio estas por vidi pli bone, infanino mia.

— Ho, avino mia ! kiel grandajn orelojn vi havas !

— Tio estas por aŭdi pli bone, filino mia.


— Ho, avino mia ! kiel grandajn dentojn vi havas !

— Tio estas por manĝi vin pli bone.

Kaj dirante tiujn ĉi vortojn, la kruela Lupo sin jetis sur la Ruĝan-Ĉapeton kaj ŝin manĝegis.

---

RIMARKO. — La tria rakonto « La Feino » estis esperantigita de Sinjoro Doktoro ZAMENHOF en *Ekzercaro* kaj Sinjoro L. DE BEAUFONT reproduktis ĝin en *Grammaire et Exercices de la langue internationale Esperanto*.



## LA BELULINO DORMANTA EN ARBARO

---

Estis iam reĝo kaj reĝino, ili bedaŭris, ke ili ne havas infanon. Nek akvoj, nek religiaj promesoj, nek pilgrimoj kondukis al la dezirata celo. Fine, tamen, la reĝino gravediĝis kaj naskis filinon. Oni faris belegan bapton, oni donis por baptopatrinaj al la princineto ĉiujn feinojn kiujn oni povis trovi en la lando (oni trovis sep) por ke ĉiu el ili faru donacon al ŝi, kiel kutimis tiam la feinoj. La princineto tiel havus ĉiujn imageblajn perfektojn. Post la festobapto, la tuta societo revenis al la palaco de l'reĝo.

Tie estis festenego por la feinoj. Antaŭ ĉiu el ili oni metis riĉegan manĝilaron. En ingo el masiva oro estis kulero, forko kaj tranĉilo el delikata oro, ornamitaj per diamantoj kaj rubenoj. Sed, kiam ĉiuj sidiĝis al la tablo, oni vidis eniri maljunan feinon, kiu ne estis invitita, ĉar de kvindek jaroj, ŝi ne eliris el sia turo: oni pensis,



ke ŝi estis mortinta aŭ ensorcita. La reĝo donigis al ŝi manĝilaron, sed estis neeble doni al ŝi similan ingon el masiva oro, ĉar oni faris nur sep, por la sep aliaj feinoj. La maljunulino trovis, ke ŝi estas malestimata, ŝi murmuris inter siaj dentoj kelkajn minacojn. Juna feino kiu sin trovis apud ŝi, aŭdis ŝin. Timante kelkan malagrablan donacon por la princineteto, ŝi tuj kaŝis sin post tapeton por malgrandigi, kiel eble plej multe, la malfeliĉon kiun la maljunulino faros.

La feinoj komencis laŭvice fari donacojn al la princineteto. La plej juna volis, ke la princineteto estu la plej bela persono el ĉiuj; la dua, ke ŝi havu tiom da spirito kiom anĝelo; la tria, que ŝi havu ĉarmon admirindan en ĉio, kion ŝi faros; la kvara, ke ŝi dancu perfekte; la kvina, ke ŝi kantu kiel najtingalo; kaj la sesa, ke ŝi ludu per diversaspecaj muzikiloj kun granda perfekteco. La vico de la maljuna feino venis; ŝi diris, skuante la kapon pro sia kolero pli ol pro maljuneco: « La princineteto pikos sian manon per ŝpinilo kaj mortos. » Tiu ĉi terura donaco tremigis ĉiujn, kaj ĉiuj ekploris. Sed, la juna feino aperis antaŭ la tapeto kaj laŭte diris: « Trankviliĝu, gereĝoj, pri tio, via filino ne mortos; bedaŭrinde mi ne havas sufiĉan potencon por neniigi tute tion, kion mia maljuna fratino faris, sed la princino pikinte sian manon per ŝpinilo, ne mortos, ŝi falos nur en profundegan dorma-

don kiu daŭros centjaron. Ĉe la fino de tju tempo, unu reĝido venos veki ŝin. »

La reĝo publikigis tuj ordonon malpermesantan ŝpini per ŝpinilo aŭ konservi ŝpinilojn en la domo sub morta puno.

Pasis dekkvin aŭ dek ses jaroj. Unu tagon, la gereĝoj foriris kamparon. La juna princino kurante tra la kastelo, supreniris al la ĉambroj kiuj sin trovis en la supro de la ĉefturo kaj eniris en ĉambreton kie bona maljunulino ŝpinis per ŝpinilo. Tiu ĉi bona virino ne sciis la malpermeson faritan de l'reĝo.

« Kion vi faras tie, mia bona homino? diris la princino. — Mi ŝpinas, mia bela infanino, respondis la maljunulino, kiu ne konis ŝin. — Ho, tio estas tre beleta! rediris la princino, kiel vi faras? donu al mi por ke mi vidu, ĉu mi farus tiel bone kiel vi. » La princino estis viva kaj iom petolema, ŝi prenis la ŝpinilon kaj tuj pikis sian manon kaj... svenis: la decido de la feinoj efektiviĝis. La bona maljunulino treege embarasita ekkriis helpon; de ĉie oni venis, oni verŝis akvon sur la vizaĝon de la princino, oni disigis ŝiajn vestojn, oni frapis ŝiajn manojn, oni frotis la tempiojn per akvo de Hungarlando, sed nenio ŝin revivigis.

Tiam, la reĝo aŭdante bruon, supreniris, kaj memorante la antaŭdiron de la feinoj, li metigis la princinon en la plej belan apartamenton de

l'palaco, sur liton broditan per oro kaj arĝento. Ŝi ŝajnis anĝelo, tiel bela ŝi estis; ŝia sveno ne malaperigis la vivajn kolorojn de ŝia vizaĝo, ŝiaj vangoj estis ĉiam rozaj kaj ŝiaj lipoj kvazaŭ koralo; ŝi havis nur la okulojn fermitajn, oni aŭdis ŝin dolĉe spiri, kion atestis, ke ŝi ne mortis.

La reĝo ordonis lasi ripozi ŝin, ĝis venos la horo vekigi. La bona feino kiu konservis al ŝi la vivon, kondamnante ŝin dormi cent jarojn, estis en la reĝolando de Matakino, dekduon da mejloj de tie ĉi, kiam la malfeliĉo okazis al la princino, sed ŝi estis rapide informita de malgrandegulo, kiu havis botojn de sep mejloj (estis botoj per kiuj oni faras sep mejlojn per unu sola paŝego). La feino tuj ekveturis kaj advenis post unu horo, per fajra ĉaro, trenita de drakoj. La reĝo prezentis la manon al ŝi, kiam ŝi malsupreniris de l'veturilo.

Ŝi aprobis ĉion, kio estis farita, sed, ĉar ŝi estis tre antaŭzorgema, ŝi pensis ke, kiam la princino vekigos, ŝi estos tre embarasita, tute sola, en tiu malnova kastelo. Ŝi tuŝis per sia vergo ĉion (krom la gereĝoj), la guvernistinojn, la honorajn fraŭlinojn, ĉambristinojn, nobelojn, oficirojn, paĝiojn, lakeojn, k. t. p. Ŝi tuŝis ankaŭ ĉiujn ĉevalojn kiuj estis en la ĉevalejoj, kun la ĉevalistoj, hundegoj de la birdokorto, kaj la malgranda Puflo, hundineto amata de la princino, kiu estis apud ŝi en ŝia lito. Tuj, ĉiuj ekdormis

por vekigi kiam ilia mastrino vekigos kaj utili al ŝi kiam ŝi bezonos. Eĉ la rostiloj, antaŭ la fajro, plenegaj je perdrikoj aŭ fazanoj ekdormis kaj la fajro subite estingiĝis. La feinoj estis lertaj en sia laboro.

Tiam la gereĝoj kisis sian karan infaninon kaj eliris el la kastelo, farante malpermeson al iu ajn iri tien. Tiu malpermeso estis superflua, ĉar, kreskis en kvarono da horo, ĉirkaŭ la parko, multe da arbegoj kaj arbetoj, sovaĝaj rozoj kaj dornoj interplektitaj, tiamaniere, ke nek besto, nek homo povis pasi tie. Oni vidis nur la supron de l'turoj, starante tre malproksime. La feino aranĝis tion, por ke la princino havu nenion por timi de la scivoluloj, dum ŝi dormos...

Pasis cent jaroj. La reĝido, kiu regis tiam, estis de alia familio ol la dormanta princino. Li ĉasis tra tiuj lokoj, kaj li demandis informojn pri la turoj kiujn li vidis, super la arbarego tre densa. Ĉiu respondis laŭ tio, kion li aŭdis diri: unuj diris, ke en tiu malnova kastelo loĝas spiritoj; aliaj, ke ĉiuj sorĉistoj de la ĉirkaŭa lando faras sian sabaton tie. La plej komuna opinio estis, ke ia Lupohomo tie loĝas kaj tien portas ĉiujn infanojn kiujn li kaptas, por manĝi ilin senĝene, ĉar li sola povas transiri la arbaron. La princo ne sciis kion kredi, kiam unu maljuna kamparano diris: « Mia princo, antaŭ pli ol kvindek jaroj, mi aŭdis mian patron diri, ke en tiu kastelo

estas la plej bela princino kiun oni povis vidi, ke ŝi devas dormi cent jarojn, tiam venos reĝido por veki ŝin kaj edziĝi kun ŝi. »

Aŭdante tiujn parolojn, la princo flamigis kaj ekkredis sen ŝanceliĝo, ke li metos finon al tiu bela aventuro kaj puŝata de amo kaj de gloro, li decidis klarigi subite tion, kio estis. Apenaŭ li alproksimiĝis al la arbaro, ĉiuj arbegoj, rozuoj kaj dornoj dekliniĝis, kaj li pasis. Li marŝis rekte al la kastelo kaj eniris, sed liaj gvardianoj ne povis sekvi lin, ĉar la arboj reproksimiĝis tuj kiam li pasis. Li daŭrigis sian vojon : princo juna kaj amema estas ĉiam brava. Li eniris en grandan birdokorton kie ĉio, kion li vidis, povis malvarmegigi lin de timo. Terura silento, penetraĵo de l'morto prezentiĝis ĉie, estis nur homaj korpoj kaj bestoj etenditaj kiuj ŝajnis mortintaj. Tamen, li rekonis per la burĝonaj nazoj kaj per la ruĝaj vizaĝoj de la pordogardistoj, ke ili dormas; iliaj glasoj enhavis ankoraŭ kelkajn gutojn da vino, ili ekdormis trinkante. Li trapasis grandan korton pavimitan per marmoro, li supreniris la ŝtuparon, eniris en la ĉambron de la gvardianoj ordigitaj kiel plektbarilo, la karabenon sur ŝultro, ronkantaj plej bone.

Li transpasis kelkajn ĉambrojn plenajn je nobeloj kaj sinjorinoj ĉiuj dormantaj, unuj staris, aliaj sidis. Li enpaŝis en oritan ĉambron kaj li vidis sur lito kies kurtenoj estis malfermitaj de

ĉiuj flankoj, la plej belan vidaĵon, kiun li neniam vidis : princinon kiu ŝajnis dekkvin aŭ deksejara, kies frunto brilis kiel dia lumo. Li proksimiĝis tremante, admirante, kaj li fleksis genuon teren. Tiam, kiam la fino de l'ensorĉo venis, la princino vekiĝis, kaj lin rigardante per okuloj pli karesaj ol unua vido ŝajnis permesi, ŝi diris : « Ĉu estas vi, mia princo? Mi atendas vin de longe. » La princo ĉarmita de tiuj ĉi vortoj kaj pli ankoraŭ per la maniero kiel ili estis diritaj, esprimis sian ĝojon kaj sian dankecon. Li certigis, ke li amas ŝin pli ol sin mem ; malbone, ordigitaj estis liaj paroloj, ili plaĉis pli : mal multe da elokventeco, multe da amo. Pli konfuza li estis ol ŝi ; tio neniun povas mirigi, ĉar ŝi estis havinta tempon por pripensi tion, kion ŝi diros al li ; ŝajnas (la historio diras tamen nenion pri tio), ke dum ŝia longega dormado, la bona feino havigis al ŝi la plezuron de agrablaj sonĝoj. Fine dum kvar horoj ili interparoladis, kaj ili diris nur la duonon da aferoj, kiujn ili deziris rakonti al si reciproke.

Dume la tuta palaco vekiĝis kun la princino, ĉiu reprenis sian oficon kaj ĉiuj svenis pro malsato, ĉar ili ne estis ĉiuj amemaj. La honora sinjorino malsatis kiel la aliaj, ŝi malpacienciĝis kaj laŭte diris al la princino, ke la manĝado estas pretigita. La princo helpis la princinon stariĝi ; ŝi estis tute vestita, eĉ riĉege, sed kiel

ŝia avino ; tamen ŝi estis tre bela. Ili iris en la salonon de l'speguloj kaj vespermanĝis tie ; la oficistoj de la princino faris servon. La violonistoj kaj obojistoj ludis tre bone malnovajn muzikaĵojn, kvankam estis pli ol cent jaroj, ke ili ne ludis ilin. Post la vespermanĝo, la princo kaj la princino geedziĝis antaŭ la pastro en la preĝejo de l'kastelo kaj la honora sinjorino akompanis ilin en ilian dormoĉambron.

Ili malmulte dormis, la princino ne bezonis. La princo ŝin lasis frumatene kaj reiris la urbon kie liaj gepatroj ĉagreniĝis pri li. La princo diris, ke ĉasante li eraris tra vojo en arbaro kaj ke li kuŝis en la dometo de karbisto kiu donis al li nur nigran panon kaj fromaĝon. La reĝo lia patro kredis al li, sed lia patrino ne estis konvinkita, vidante ke ĉiutage preskaŭ, li ĉasas kaj ke li havas ĉiam pretekston por senkulpigi sin kiam li dormis ekstere. Ŝi komprenis, ke li enamiĝis.

Li vivis kun la princino pli ol du plenajn jarojn : du infanoj naskiĝis ; la unuanaskita kiu estis filino, estis nomata *Aŭroro*, kaj la duanas-kita kiu estis knabo, estis nomata *Taglumo*, ĉar li estis ankoraŭ pli bela ol lia fratino. Ofte la reĝino patrino provis konfesigi sian filon esperante eltrovi lian sekreton, sed li kuraĝis neniam sin konfidi al ŝi, li amis ŝin, sed li ŝin timegis, ĉar ŝi estis idino de Lupohomoj. La reĝo edziĝis kun ŝi pro ŝia granda riĉeco. Mallaŭte en la kor-

tego oni diris, ke ŝi multe penadis por ne ĵeti ŝin sur infanetojn. Pro tio la juna princo nenion diris.

Sed kiam la reĝo lia patro mortis, li fariĝis mastro, tiam li publike anoncis sian edzecon, kaj li solenigis per belegaj festoj, la eniron de sia edzino meze de siaj du infanoj en la ĉefurbon.

Post iom da tempo, la reĝo foriris por milito kontraŭ la imperiestro Kantalabuto, sia najbaro. Li lasis la reĝecon al la reĝino patrino, kaj li tre rekomendis al ŝi sian edzinon kaj siajn infanojn. Li devis militi la tutan someron. Tuj kiam li foriris, la reĝino patrino sendis sian bofilinon kaj siajn genepojn al kampodomo en arbaro, por ke senĝene ŝi povu satigi sian teruran avidecon.

Kelkajn tagojn poste ŝi iris tien, kaj, vespere, diris al sia kuirejestro: « Mi volas manĝi, ĉe mia tagmeza manĝo, la malgrandan Aŭroron. — Ha! Sinjorino! diris la kuirejestro. — Mi volas, diris la reĝino per terurega voĉo de Ogrino, avida manĝi freŝan viandon. Mi ĝin volas manĝi kun saŭco Roberto. » La malfeliĉa homo bone vidis, ke estis neeble kontraŭbatali Ogrinon; li prenis tranĉilegon, supreniris al la ĉambro de la malgranda Aŭroro. Ŝi estis kvarjara kaj venis saltante kaj ridante sin ĵeti sur lian kolon kaj peti bombonon de li. Li ekploris; el la manoj la tranĉilego falis kaj li iris en la birdokorton buĉi ŝafideton. Li faris por ĝi bonan saŭcon, tiel bonan



saŭcon, ke la mastrino diris, ke ŝi mangis neniam ion pli bonan. Samtempe li forportis la malgrandan Aŭroron kaj donis ŝin al sia edzino kiu ŝin kaŝis en loĝejo en la fundo de la birdokorto.

Ok tagojn poste, la kruela reĝino diris : « Mi volas manĝi por mia vespermanĝo la malgrandetan Taglumon. » La kuirejestro ne respondis, ĉar li decidis trompi ŝin kiel la unuan fojon. Li serĉis la malgrandetan Taglumon, kaj trovis lin batalantan per rapiro kontraŭ simiego, li tamen estis nur trijara. Li do forportis lin al sia edzino, kiu lin kaŝis kun la malgranda Aŭroro, kaj anstataŭigis lin per kaprideto tre mola, kiun la Lupo-homino trovis admirinde bona.

Ĉio iris tre bone ĝis tiam, sed unu fojon, la malbona reĝino diris : « Mi volas manĝi la junan reĝinon kun la sama saŭco kiel ŝiajn infanojn. » Tiam la malfeliĉa kuirejestro malesperis. Kiel trompi ŝin ankoraŭ ? La juna reĝino estis pli ol dudekjara ne aldonante la cent jarojn dum kiuj ŝi dormis ; ŝia haŭto estis malmoleta kvankam blanka kaj bela. Li pensis, ke estos neeble trovi en la bestejo beston tiel malmolan kiel ŝi ; li decidis por savi sian vivon, tranĉi la gorgon al la reĝino. Li supreniris en ŝian ĉambron kaj li intencis ne ŝanceliĝi, li koleregis, kaj eniris, ponardon en la mano, en la ĉambron de la juna reĝino. Tamen, li ne volis surprizi ŝin, kaj kun respekto li diris al ŝi la ordonon ricevitan :


« Faru, faru, ŝi diris, streĉante la kolon, efektivegu la ordonon kiun vi ricevis, mi kore iros revidi miajn karajn infanojn, kiujn mi amegis ! » Ŝi pensis, ke ili mortis de l'tempo kiam oni formetis ilin, dirante nenion al ŝi. — « Ne, ne, Sinjorino, respondis la kuirejestro kortuŝita, vi ne mortos, kaj vi revidos viajn karajn infanojn. Ili estas ĉe mi, kie mi kaŝis ilin, ankoraŭ mi trompos la reĝinon kaj mi donos al ŝi por manĝi junan cervinon anstataŭ vi. » Tuj li kondukis ŝin en sian ĉambraron, la reĝino ĉirkaŭprenis siajn infanojn, kaj li iris prepari la cervinon, kiun la reĝino manĝis vespere kun la sama apetito kiel se ŝi estus la juna reĝino. Ŝi estis tre kontenta pri sia krueleco kaj ŝi intencis diri al la reĝo, kiam li revenos, ke la sovaĝaj lupoj manĝegis lian edzinon kaj liajn infanojn.

Vespere, kiam ŝi vagis, laŭ sia kutimo en la kortoj kaj birdokortoj de l'kastelo por enspiri kelkan freŝan karnon, ŝi aŭdis en malalta salono la malgrandan Aŭroron, kiu petis pardonon por sia frato. La malgrandeta Taglumo ploris, ĉar la reĝino vipis li por ia malbonaĵo kiun li faris. La Lupohomino rekonis la voĉon de la reĝino, ŝi furiozis, ke ŝi estis trompita. Ŝi ordonis, la sekvantan tagon matene, per terura voĉo kiu tremigis ĉiujn, ke oni alportu en la korton, kuvegon plenan je viperoj, bufoj, kolubroj kaj serpentoj, por ĵeti tien la reĝinon, ŝiajn infanojn, la kuire

jestron, lian edzinon kaj lian servistinon. Ŝi donis ordonon konduki ilin kun manoj ligitaj malantaŭ la dorso.

Ĉiuj estis tie, la mortigistoj sin preparis ĵeti ilin en la kuvegon, kiam la reĝo ne atendita eniris en la korton sur sia ĉevalo. Li tre miris kaj demandis kion signifas tiu terura vidaĵo. Neniu kuraĝis raporti al li, kiam subite la Lupo-homino furioza, ke ŝi ne povu plenumi sian venĝon, ĵetis sin mem kapon malsupren en la mezon de l'kuvego. Tuj ŝi estis manĝita de la malbelaj bestoj kiuj estis interne.

La reĝo ne ĝogis, ŝi estis lia patrino, sed li konsoliĝis baldaŭ per sia bela edzino kaj siaj infanoj.



## LA MAJSTRO KATO

AŬ

### LA KATO PIEDVESTITA PER BOTOJ

---

Unu muelisto lasis al siaj tri infanoj nur sian muelejon, sian azenon kaj sian katon. La divido baldaŭ estis farita, la heredintoj ne vokis notaron, nek advokaton kiuj formangis baldaŭ la tutan malriĉan heredon. La unuanaskito prenis la muelejon, la duanaskito prenis l'azenon kaj la plej juna prenis nur la katon. Tiu lasta frato ne povis konsoliĝi pri sia malgrasa parto, li diris : « Miaj fratoj honeste akirados rimedojn por vivi, sin ligante ambaŭ kune, sed mi, kiam mi estos manĝinta miam katon, kaj mi estos farinta mufon el ĝia felo, mi devos morti de malsato. »

La kato kiu aŭdis lin sed ŝajnis nenien kompreni, diris al li trankvile kaj serioze : « Ne malĝoju, mia mastro, donu al mi sakon kaj farigu por mi paron da botoj per kiuj mi povos iri en arbaron, kaj vi vidos, ke vi profitos tiom, kiom viaj fratoj. »

La mastro de l'kato malmute kredis tion, kion ĝi diris, tamen li sciis, ke ĝi estas tiel lerta por kapti ratojn kaj musojn (li vidis ĝin pendanta per kruretoj aŭ kaŝata en faruno kvazaŭ ĝi estus mortinta), ke li ne malesperis/esti helpata de ĝi en sia mizereco.

Tuj kiam la kato havis tion, kion ĝi petis, brave ĝi metis la botojn sur siajn piedojn, la sakon sur sian kolon, ĝi prenis la ŝnurojn per siaj du antaŭaj piedetoj kaj foriris tra la kamparo, kie troviĝis multe da kunikloj. Ĝi estis metinta branon kaj laĉojn en sian sakon, ĝi sterniĝis senmove kvazaŭ mortinte, kaj atendis la momenton kiam kelka juna kuniklo ne scianta la ruzojn de l'mondo, venos ĵeti sin en ĝian sakon por manĝi la branon, kiun ĝi tien metis. Apenaŭ ĝi ekkuŝis, ĝi havis kontentecon : juna petola kuniklo eniris ĝian sakon. La Majstro kato tuj tiris la ŝnurojn, prenis kaj senkompate mortigis la kuniklon.

Tre kontenta pri sia akiro, ĝi foriris al la palaco de l'reĝo, kaj petis la permeson paroli kun li. Oni ĝin suprenirigis al la ĉambraro de Lia Moŝto ; ĝi faris multajn riverencojn antaŭ la reĝo kaj diris al li : « Jen estas, via reĝa Moŝto, kuniklo el kamparo, kiun sinjoro markizo de Karaba (tia estis la nomo, kiun ĝi elektis por sia mastro) ordonis al mi prezenti al vi. — Diru al via mastro, respondis la reĝo, ke mi lin dankas

kaj ke li plezurigis min. » Alifoje ĝi sin kaŝis en kampo da greno, tenante ĉiam sian sakon malfermitan : du perdrikoj venis internen, ĝi tiris la ŝnurojn kaj kaptis ilin ambaŭ. Poste ĝi portis ilin al la reĝo, kiel ĝi faris por la kuniĝlo. La reĝo plezure ricevis ankoraŭ la du perdrikojn kaj donis al ĝi trinkmonon. Tiel daŭrigis la kato dum du aŭ tri monatoj, donacadi de tempo al tempo, ĉasaĵon de ĝia mastro al la reĝo.

Unu tagon ĝi sciigis, ke la reĝo promenados sur la riverbordo kun sia filino, la plej bela princino en la tuta mondo ; ĝi diris al sia mastro : « Se vi volas obei mian konsilon, vi estos baldaŭ riĉa : venu bani vin en la rivero, en loko kiun mi montros al vi, poste lasu min agi. »

La falsita markizo de Karaba faris tion, kion lia kato konsilis al li. La reĝo pasis dum li sin banis. Subite la kato fortege ekkriis : « Helpon ! helpon ! sinjoro markizo de Karaba dronas. » La reĝo metis la kapon tra la pordo de l'veturilo kaj rekonis la katon kiu ofte alportadis al li ĉasaĵon. Li ordonis al siaj gvardianoj, ke ili iru rapide doni helpon al sinjoro markizo de Karaba. Dum oni tiris la malfeliĉan markizon el la rivero, la kato proksimiĝinte al la reĝo diris, ke dum la bano de ĝia mastro, ŝtelistoj forportis liajn vestojn, malgraŭ ke ĝi kriis per la tuta forto : « Ŝtelistoj ! Ŝtelistoj ! » (La ruza fripono kaŝis la vestojn sub ŝtonego.) La reĝo tuj ordonis al siaj

ĉambelanoj, ke ili alportu plej belajn vestojn por sinjoro markizo de Karaba.

La reĝo faris al li multe da karesoj. La belaj vestoj plibeligis lian bonan mienon (ĉar li estis bela kaj bontalia). La filino de l'reĝo trovis lin tre agrabla; tiam la markizo ĵetis al ŝi du aŭ tri rigardojn treege respektajn kaj iom karesemajn kiuj igis ŝin enamiĝi ĝis freneziĝo. La reĝo volis, ke li eniru en la reĝan kaleŝon por daŭrigi la promenadon. La kato estis ravita vidante kiel prosperis ĝia intenco, ĝi iris antaŭen, kaj renkontinte kamparanojn kiuj falĉis, ĝi diris al ili: « *Bravaj homoj kiuj falĉas, se vi ne diros al la reĝo, ke la herbejo kiun vi falĉas apartenas al sinjoro markizo de Karaba, vi estos hakitaj ĉiuj, kvazaŭ viando por pasteĉo.* »

Momenton post la reĝo pasis kaj demandis kies estis tiu herbejo. « Ĝi estas de sinjoro markizo de Karaba, respondis kune la falĉistoj, ĉar la minacoj de l'kato timigis ilin ĉiujn. — Vi havas tie belan bienon, diris la reĝo al la markizo. — Kiel vi vidas, via reĝa Moŝto, respondis la markizo. » La Majstro kato iris ĉiam antaŭen, ĝi renkontis rikoltistojn kaj diris al ili: « *Bravaj homoj kiuj rikoltas grenon, se vi ne diros al la reĝo, ke tiu ĉi greno apartenas al sinjoro markizo de Karaba, vi estos hakitaj, kvazaŭ viando por pasteĉo.* » La reĝo pasante volis scii al kiu apartenas tiuj grenoj kiun li vidas. « Ĝi apartenas al

sinjoro markizo de Karaba, respondis la rikoltistoj. » La reĝo ĝojis ankoraŭ kun la markizo. La kato ĉiam antaŭiris la kaleŝon, kaj same parolis al ĉiuj, kiujn ĝi renkontis... kaj la reĝo miris pri la grandaj bienoj de sinjoro markizo de Karaba.

Fine la Majstro kato alvenis en belan kastelon kies la estro estis Lupohomo la plej riĉa kiun oni iam vidis : ĉiuj tiuj bienoj, tra kiuj pasis la reĝo, dependis de tiu ĉi kastelo, zorge, la kato esploris kiu estas kaj kion faras tiu Lupohomo, kaj petis permeson paroli kun li, dirante ke ĝi ne volas pasi apud tiu bela kastelo, ne havante la honoron saluti lin. La Lupohomo ĝin ricevis tiel afable kiel Lupohomo povas fari kaj li sidigis ĝin.

« Oni certigis min, diris la kato, ke vi facile aliformigas vin jen en leonon, jen en elefanton, k. t. p. » La Lupohomo respondis : « Tio estas vera, kaj vi tuj vidis min leono... » La kato ekstremis vidante leonon antaŭ si, rapidege ĝi ekkuris sur la tegmenton, ne senpene, nek sendangere, pro ĝiaj botoj kiuj ne taŭgis por marŝi sur la akvaj tuboj. Tamen la Lupohomo reprenis sian unuan formon, tiam la kato malsupreniris, konfesis sian timegon kaj aldonis : « Oni certigis min ankoraŭ, sed mi ne povas kredi tion, ke vi facile aliformigas vin en bestetojn, ekzemple en muson, en raton, k. t. p., mi pensas ke tio estas nebla. —



Neebla! ekkriis la Lupohomo, vi tuj vidostion. » Subite li fariĝis muso, kaj ekkuris sur la planko. Tuj la kato saltis sur la muson kaj ĝin manĝis.

Fine la reĝo vidante proksime tiun belan kastelon volis eniri tien. La Majstro kato aŭdis la bruon de la kaleŝo ruliĝanta sur la levebla ponto, ĝi kuris antaŭ la reĝon kaj diris: « Via reĝa Moŝto mi deziras al vi bonvenon en tiu ĉi kastelo de sinjoro markizo de Karaba! — Ho! sinjoro markizo, ekkriis la reĝo, tiu ĉi kastelo estas via? Ĉu estas eble vidi ion pli belan ol tiu korto kaj tiuj konstruaĵoj ĉirkaŭ ĝi. »

La markizo prezentis la manon al la juna princino kaj sekvante la reĝon kiu supreniris la unua, ili eniris en grandan salonon, kie troviĝis belega manĝeto kiun la Lupohomo estis preparinta por siaj amikoj, kiuj devis viziti lin, en tiu tago, sed kiuj ne kuraĝis eniri, sciante ke la reĝo estis tie.

La reĝo estis ravita de la bonaj ecoj de l'markizo; lia filino tre ekamis lin; kaj vidinte la grandajn bienojn posedatajn de sinjoro de Karaba, la reĝo diris al li, post eltrinko de kvin aŭ ses glasoj: « De vi dependas, sinjoro markizo, ke vi estu mia bofilo. » La markizo faris multajn riverencegojn kaj akceptis sen ŝanceliĝo la honoron faritan de l'reĝo. Tiun saman tagon, li edziĝis kun la princino.

La kato fariĝis granda sinjoro, kaj ne ĉasis plu la musojn, krom nur por sin amuzi.

## CINDRULINO

aŭ

## LA VITRA PANTOFLETO

---

Estis foje nobelo, kiu post la morto de sia unua edzino, edziĝis kun virino la plej malhumila kaj la plej fiera kiun oni povis vidi. Ŝi havis du filinojn perfekte similajn al ŝi ; la edzo, de sia flanko, havis filinon ĉarman kaj nekompareble bonan. Ŝi heredis tiujn belajn ecojn de sia patrino, kiu estis la plej bonfara en la mondo.

Tuj kiam la edziĝofestoj estis faritaj, la duonpatrino ekmontris malbonan humoron ; la bonaj ecoj de la juna knabino faris ŝiajn filinojn ankoraŭ plu malamindaj. Ŝi mastrumis kaj sin okupis per la plej humilaj laboroj dome ; ŝi purigis la telerojn kaj ŝtuparojn, ŝi balais la ĉambrojn de la sinjorino kaj fraŭlinoj ; ŝi kuŝis supre de l'domo, en subtegmento, sur pajla malbona matraco, dum ŝiaj fratinoj kuŝis en ĉambroj pargetaj, kie estis belaj litoj kaj grandaj speguloj. La malfeliĉa

knabino pacience suferis kaj ne kuraĝis plendi al sia patro, pro timo de liaj riproĉoj, ĉar lia edzino tute guvernis lin. Kiam ŝi estis farinta laboron, ŝi metis sin en angulon de l'kameno, kaj sidiĝis en la cindro : pro tio, oni ordinare ŝin nomis : *Cindrulino*.

Tamen Cindrulino, malgraŭ siaj malbelaj vestoj, estis multe pli bela al ŝiaj duonfratinoj kvankam tre riĉe vestitaj.

Okazis ke la reĝido donis balon, li petis la altrangajn personojn ĉeesti ĉe tiu balo. La du fratinoj estis invititaj. Tio tre okupis ilin pro la elekto de la vestoj aŭ ornamaĵoj kiuj plibeligus ilin. Tio estis nova laboro por Cindrulino ; ŝi gladis tolaĵon, amelumis manumojn ; oni parolis hejme nur pri maniero sin vesti : « Mi metos mian robon el ruĝa veluro, kaj mian punton el Anglujo, diris la unuanaskita. — Mi prenos mian ordinaran jupon, sed plie mian mantelon broditan per oraj floroj kaj mian ĉirkaŭkolon faritan el diamantoj, diris la dua. » Oni sendis venigi la plej bonan frizistinon, oni aĉetis muŝojn preparitajn de la plej lerta faristino. Ili petis Cindrulino, ke ŝi donu sian konsilon, ĉar ŝi havis bonegan guston. Cindrulino konsilis al ili kiel eble plej bone, ŝi eĉ kombis ilin. Dum ŝi kombis, ili diris al ŝi : « Ĉu vi ne estus feliĉa, Cindrulino, iri al la balo ? — Ve ! fraŭlinoj, vi simple volas moki min, tio ne estas por mi. — Vi estas prava,

oni bone ridus se oni vidus Cindrulinon iri al la balo ! » Malgraŭ iliaj malbonaj paroloj, ŝi kombis ilin perfekte. Dum preskaŭ du tagoj, ili ne manĝis, tiom ili ĝojis. Oni rompis almenaŭ dekduon da laĉoj premante ilian talion, kaj ĉiam ili estis antaŭ la spegulo.

Fine la dezirita tago venis, oni foriris. La malgaja Cindrulino ilin sekvis per la okuloj, kiel eble plej longe, kiam ŝi plu ne vidis ilin, ŝi ekploris. Ŝia baptopatrino kiu ŝin vidis ploreganta, demandis : « Kial vi ploras ? — Mi tre volus... mi tre volus... » Tiel forte, ŝi ploris, ke ŝi ne povis paroli. Ŝia baptopatrino estis feino, ŝi diris : « Ĉu vi volus iri al la balo ? — Ho, jes, diris Cindrulino ekĝemante. — Nu ! se vi estos bona knabino, mi faros, ke vi iros tien. Iru en la ĝardenon, kaj alportu al mi kukurbon. » Cindrulino tuj serĉis la plej dikan kiun ŝi povis trovi, alportis ĝin al sia baptopatrino, ne povante diveni kiel tiu kukurbo povos igi ŝin iri al la balo. La baptopatrino malplenigis ĝin, lasante nur la ŝelon, ŝi tuŝis la kukurbon per sia vergeto kaj ĝi tuj fariĝis bela orita kaleŝo.

Poste ili trovis en muskaptilo, ses musojn tute vivajn. Dum Cindrulino levis la pordeton de l'muskaptilo, la baptopatrino frapante ilin per sia vergeto aliformigis la musojn en belajn belgri-zajn ĉevalojn. Por fari veturigiston, Cindrulino serĉis la ratkaptilon kie troviĝis tri rategoj. La

feino elektis unu pro ĝia granda barbo kaj tuŝinte ĝin, aperigis veturigiston, kiu havis la plej belajn lipharojn, kiujn oni iam vidis. Poste, ŝi diris al Cindrulino : « Iru en la ĝardenon, vi trovos ses lacertojn post la verŝilo, alportu ilin al mi. » La feino ŝanĝis ilin en ses lakeojn kiuj rapide supreniris posten de la kaleŝo. Ili portis ornamitajn vestojn kaj staris kiel se ili farus tion dum sia tuta vivo. Tiam, la feino diris : « Nu, jen estas per kio iri al la balo. Ĉu vi estas kontenta ? — Jes, sed mi ne povas iri tien, tiel malbone vestita. » La baptopatrino ŝin tuŝis per la vergeto, kaj samtempe, ŝiaj malbelaj vestoj fariĝis ŝtofo ora kaj arĝenta, tute ornamita per brilantaj ŝtonetoj. La feino donis ankoraŭ al Cindrulino paron da pantofloj el vitro, la plej belajn en la mondo.

Kiam ŝi estis tiel bele vestita, ŝi supreniris en la kaleŝon ; sed la baptopatrino rekomendis al ŝi, iri returnen antaŭ noktomezo, anoncante al ŝi, ke, se ŝi restos en la balo momenton plie, la kaleŝo refariĝos kukurbo, la ĉevaloj refariĝos musoj, la lakeoj denove fariĝos lacertoj, kaj la belaj vestoj reprenos sian unuan formon. Ŝi promesis kaj foriris tre ĝoja.

Oni diris al la reĝido ke granda princino nekonnata venis ; li kuris ŝin akcepti, li donis la manon al ŝi kiam ŝi malsupreniris el la kaleŝo kaj ŝin akompanis en la salonon, kie estis la gereĝoj.

Tiam fariĝis granda silento ; la dancoj haltis, la violonoj plu ne ludis, atente oni rigardis la grandan belecon de tiu nekonata. Oni aŭdis kvazaŭ konfuzan bruon : « Ho ! kiel ŝi estas bela ! » Eĉ la maljuna reĝo ŝin admiris kaj mallaŭte diris al la reĝino : « Estas longatempe, ke mi ne vidis tiel belan kaj amindan personon ! » Ĉiuj sinjorinoj cirkaŭrigardis ŝian ĉapelon kaj ŝian kostumon por farigi al ŝi similajn vestojn, se ili povos trovi ŝtofojn sufiĉe belajn, kaj laboristojn sufiĉe lertajn.

La reĝido ŝin sidigis en honoran lokon, kaj invitis ŝin por danci. Ŝi dancis belmove, kaj tiom pli oni admiris ŝin. Oni alservis belan manĝeton, la princo nenion manĝis, ĉar li estis tro okupata rigardi ŝin. Ŝi sidiĝis apud siaj fratinoj, ŝi faris al ili multe da ĝentilaĵoj, ŝi donis al ili jen la oranĝojn, jen la citronojn kiujn la princo prezentis al ŝi. La du fratinoj miris, ĉar ili ne rekonis ŝin. Dum ili parolis kune, Cindrulino aŭdis soni la tri kvaronojn de la dekdua horo, tuj ŝi faris riverencon antaŭ la gereĝoj, kaj foriris plej rapide kiel eble.

Kiam ŝi alvenis domon, ŝi dankis sian baptopatrinn kaj diris al ŝi, ke ŝi dezirus multe iri al la balo la sekvantan tagon, ĉar la reĝido tre invitis ŝin. Ŝi rakontis ĉion, kio estis farita en la balo. Fine la du fratinoj revenis kaj frapis la pordon. Cindrulino malfermis tuj : « Kiel vi

revenas malfrue », ŝi diris oscedante kaj frotante siajn okulojn, kvazaŭ se ŝi ĵus vekigis. Tamen ŝi tute ne bezonis dormi. « Se vi estus veninta al la balo, diris unu el ŝiaj fratinoj, vi vidus la plej belan princinon kiun oni povas vidi; ŝi faris al ni multe da ĝentilaĵoj; ŝi donis al ni oranĝojn kaj citronojn. » Cindrulino ĝojis kaj demandis la nomon de tiu princino, sed ili respondis: « Neniu ŝin konas, sed mi pensas, ke la reĝido revas pri ŝi kaj donus ĉion en la mondo por scii kiu ŝi estas. » Cindrulino ridetis kaj diris: « Ĉu ŝi estas do tre bela? mia Dio! Kiel vi estas feliĉaj! Ĉu mi ne povos vidi ŝin? Fraŭlino Ĵavoto, pruntu al mi vian flavan veston kiun vi metas ĉiutage? — Vere, diris fraŭlino Ĵavoto, mi opinias, ke mi estus freneza, se mi pruntus mian veston al tia malbela cindrulino. »

La sekvantan tagon, la du fratinoj iris denove al la balo, kaj Cindrulino ankaŭ, sed pli bone vestita ol la unuan fojon. La reĝido ĉiam restis apud ŝi kaj diris al ŝi multajn agrablaĵojn. La juna fraŭlino ne enuis kaj forgesis la malpermeson faritan de sia baptopatrino, tiamaniere, ke la unua bato de noktomezo sonis, kiam ŝi pensis, ke estas apenaŭ la dekunua horo. Rapide ŝi levigis kaj forkuris tiel malpeze kiel cervino.

La princo ŝin sekvis, sed ne povis atingi ŝin. Dum ŝi kuris, unu el ŝiaj vitraj pantofloj falis teren; la princo ĝin relevis kaj ĝin kaŝis. Cindru-

lino reirante domen spiregis, sed ŝi estis sen kaleŝo, sen lakeoj, kaj vestita per siaj malbelaj vestoj; nenio restis al ŝi de ŝia granda eleganco, krom unu el ŝiaj pantofletoj simila al tiu, kiun ŝi lasis fali teren.

Oni demandis la gvardianojn, ĉe la pordo de l'palaco, ĉu ili vidis eliri princinon; ili vidis nenian princinon sed junan malriĉan knabinon, kiun ŝajnis pli vere vilaĝanino sed ne fraŭlino.

Kiam revenis la du fratinoj. Cindrulino denove demandis ilin ĉu la bela sinjorino venis al la balo? — « Jes, ili diris, ŝi forkuris tiel rapide, ke ŝi lasis fali teren unu el siaj vitraj pantofloj, la plej beleta en la mondo. La reĝido ĝin relevis kaj konservis; sendube, mi pensas, li tre amas la belan personon al kiu apartenas tiu pantoflo. » Ili parolis ĝuste, ĉar kelkajn tagojn poste, la reĝido publikigis per sonado de ĉaskorno, ke li edziĝos kun tiu, kies piedo eniros en la pantofleton.

Oni komencis provi ĝin sur la princinoj, poste sur la dukinoj, kaj sur la tuta kortego, sed vane. Oni ĝin portis al la du fratinoj, kiuj faris ĉion eblan por enirigi sian piedon en la pantoflon, sed ili ne sukcesis.

Cindrulino, rigardante ilin, rekonis sian pantoflon, kaj diris ridante: « Lasu ankaŭ mi ĝin provi! » Ŝiaj fratinoj ekridis kaj ŝin mokis. Tamen, la nobelo kiu provigis la pantoflon, atente rigardis Cindrulinon, li trovis ŝin tre bela,



kaj diris, ke tio estas prava. Li sidigis Cindrulino, kaj proksimigante la pantoflon al ŝia piedeto, li vidis tuj, ke senpene ĝi eniros kiel ganto.

La du fratinoj miris kaj ilia miro pliiĝis ankoraŭ, kiam Cindrulino eltiris el sia poŝo la duan pantofleton per kiu ŝi piedvestis la alian piedon.

Tiam alvenis la feino, kiu frapis per sia vergeto la vestojn de Cindrulino. Subite ili fariĝis pli belaj ol la vestoj de antaŭe.

La du fratinoj rekonis en ŝi la belan personon kiun ili vidis en la balo. Ili sin ĵetis al ŝiaj piedoj, petante pardonon de ŝi, pri ĉiuj malbonaĵoj kiujn ili altrudis al ŝi. Cindrulino relevis kaj kisis ilin, dirante, ke ŝi pardonas ilin bonkore. Oni kondukis ŝin al la princo, kiu trovis ŝin ankoraŭ pli bela. Kelkajn tagojn poste, li edziĝis kun ŝi.

Cindrulino, tiel bona kiel bela, loĝigis siajn fratinojn en la palaco, kaj edzinigis ilin, la saman tagon, kun du sinjoroj de la kortego.



## RIKETO KUN LA TUFO

---

Unu fojon, reĝino naskis filon malbelan kaj malbontalian; longatempe oni dubis ĉu li havas homan formon. Feino, kiu ĉeestis ĉe lia naskiĝo, certigis ke li estos aminda kaj ke li havos grandan spritecon, eĉ, ŝi aldonis, ke li povos, per la forto de l'donaco kiun ŝi ĵus faris al li, doni tiom da sprito, kiom li havos al la persono kiun li amos pleje. Tio ĉi konsolis iom la kompatindan reĝinon, kiu bedaŭregis ke ŝi havas tiel malbelan infanon. Efektive, tuj kiam li komencis paroli, li diris multe da belaj aferoj; en ĉiuj liaj agoj, li havis tiom da lerteco, ke li mirigis ĉiujn. Mi forgesis diri ke li naskiĝis kun tufeto da haroj sur la kapo, tial oni nomis lin *Riketo kun la Tufo*, ĉar Riketo estis lia familia nomo.

Post sep aŭ ok jaroj, la reĝino de najbara reĝlando akuŝiĝis je du filinoj. La unuanaskita estis pli bela ol la tago; la reĝino estis feliceĝa pro

tie ; oni timis ke la malmodereco de ŝia ĝojo malsanigos ŝin... La sama feino kiu ĉeestis ĉe la naskiĝo de l'malgranda Riketo kun la Tufo, estis tie kaj ŝi anoncis al la reĝino, ke tiu princineto ne havos spriton, ke ŝi estos tiel malsprita kiel bela... Tio humiligis la reĝinon, sed kelkajn momentojn poste naskiĝis dua filino treege malbela. La reĝino malĝojegis, tiam la feino diris : « Via filino, Sinjorino, ricevos kompenson ; ŝi havos tiom da sprito, ke oni ne vidos ŝian malbelecon. — Dio volu tion ! diris la reĝino, sed, ĉu ne ekzistas rimedon por doni iom da sprito al la unua kiu estas tiel bela ? — Mi farus ĉion por ke vi estu kontenta, Sinjorino, diris la feino, tial mi donacas al ŝi la povon beligi la personon kiu plaĉos al ŝi. »

La du princinoj grandiĝis, iliaj ecoj grandiĝis samtempe. La famo publikigis la belecon de la unuanaskita kaj la spriton de la duanaskita kiu kun ĉiu tago fariĝadis pli malbela dum ŝia fratino fariĝadis pli malsprita. Tiu ĉi estis tiel mallerta, ke ŝi ne povis ordigi kelkajn porcelanajn objektojn sur la rando de kameno, ne disrompante unu ; nek trinki glason da akvo, ne disverŝante la duonon sur siajn vestojn, kvankam la beleco estas granda utilaĵo ĉe junulino, tamen la sprito de la duanaskita altiris ĉiujn vizitantojn. Oni admiris la unuan kaj oni miregis aŭdante la agrablajn aferojn kiujn diris la dua.

La reĝino faris rimarkon al sia filino pri ŝia malspriteco kaj la kompatinda princino pensis, ke ŝi mortos de honto kaj de doloro.

Iam, ŝi iris en arbaron, tie, sola, ŝi ploris sian malfeliĉecon, sed, ĵen, hometo tre malagrable, kvankam riĉege vestita, proksimiĝis al ŝi. Li estis la juna princo Riketo kun la Tufo, kiu amegis ŝin laŭ ŝiaj portretoj kiuj trakuris la mondon. Li forlasis sian reĝolandon por havi la plezuron vidi ŝin kaj paroli kun ŝi. Li iris al ŝi kun la tuta ebla gentileco kaj respekto kaj faris al ŝi la ordinarnajn komplimentojn, sed la melankolia princino nenion respondis. Tiam li vidis la malĝojecon de la princino kaj diris : « Mi ne komprenas, Sinjorino, ke persono tiel bela kiel vi, povu esti ankaŭ malgaja ; mi neniam vidis iun kies beleco estus komparebla al la via. — Plaĉas al vi dirition, Sinjoro, respondis la princino, kaj ŝi haltis tie. — La beleco, rediris Riketo kun la Tufo, estas tia bono, ke ĝi anstataŭas ĉiujn, vi posedas tiun bonon kaj mi ne vidas kio povas ĉagreni vin. — Ho ! diris la princino, mi volus pli bone esti tiel malagrable kiel vi, kaj havi spriton ol havi belecon kaj esti malsprita kaj nescianta kiel mi estas. — Ĉar vi deziras spriton, tio estas pruvo ke ĝi ne mankas al vi. — Mi ne scias, diris la princino, sed mi estas naivega, kaj la ĉagrenego kiu mortigas min venas de tio. — Tiam, diris Riketo kun la Tufo, mi facile finigos vian ĉagre-

non. — Kiel vi povus fari? diris la princino. — Mi havas povon, Sinjorino, diris Riketo, ke mi povas doni tiom da sprito, kiun oni povas havi, al la persono kiun mi amas pleje, ĉar vi estas tiu persono, Sinjorino, se nur vi bone volas esti mia edzino, mi donos al vi tiom da sprito, kiom vi deziras. » La princino surpriziĝis kaj respondis nenion. « Mi vidas, rediris Riketo, mi vidas ke mia propono vin ĉagrenis, mi ne miros pro tio, kontraŭe mi donas al vi tutan jaron por pripensi. » La princino en sia naiveco imagis, ke la fino de l'jaro neniam venos, tial ŝi akceptis la proponon faritan al ŝi. Tuj kiam ŝi faris promeson iĝi edzino de Riketo, post unu jaro, en la sama tago, ŝi sentis la ŝanĝon; ŝi trovis nekredblan facilecon por diri ĉion, kio plaĉis al ŝi, kaj ĝin diri per sprita, facila kaj natura maniero. De tiu momento, ŝi komencis aminduman interparoladon kun Riketo; ŝi babiladis tiel bone, ke Riketo kun la Tufo timis ke li donis al ŝi pli da sprito ol li rezervis por si mem. Kiam ŝi revenis en la palacon, la tuta kortego miris pri tiu subita metamorfozo, ŝi plu ne diris malrespektajn, sed multe da aferoj saĝaj kaj senfine spritaj. La korteganoj ĝojis pri tio; ho ve! la duanaskita ne ĝojis; plu ne havante, kontraŭ sia fratino, la profiton de la sprito, ŝi ŝajnis apud ŝi, tre malagrabla simiino. Kelkfoje la reĝo kondukis laŭ ŝiaj konsiloj aŭ kunmetis la konsilantaron en ŝia

apartamento. La famo disportis tiun ŝanĝon. Ĉiuj junaj princoj de la najbaraj reĝolandoj iĝis amemaj kaj ŝin petis kiel edzinon, sed ŝi trovis inter ili neniun kiu havus sufiĉe da sprito. Tamen, unu venis, li estis potenca, riĉa, ŝprita kaj bontalia, ŝi sentis por li bonvolon. Ŝia patro diris al ŝi, ke ŝi povu libere elekti sian edzon. Ŝi dankis sian patron kaj ne prenis decidon, ĉar ju pli da sprito oni havas, des pli malfacile oni povas decidiĝi pri tia afero.

Okaze, ŝi iris en la saman arbaron kie ŝi trovis Riketon kun la Tufo. Profunde ŝi revis kiam ŝi audis surdan bruon, sub siaj piedoj, kvazaŭ multaj personoj moviĝas. Unu diris : « Alportu al mi tiun kaldronon », alia : « Metu lignon en la fajron. » Samtempe la tero malfermiĝis kaj ŝi vidis grandan kuirejon plenan je kuiristoj, servistoj kaj ĉiuj oficistoj necesaj por fari belegan festenon. El ĝi eliris dudek aŭ tridek rostigistoj kiujn sin lokis en aleo de la arbaro, ĉirkaŭante longan tablon, ĉiuj havis lardilon en mano, voston de vulpo sur orelo, ili eklaboris dum oni aŭdis harmonian kanteton. La princino miris kaj demandis la plej rimarkeblan el ĉiuj, por kiu ili laboras. « Ni laboras, diris la kuirejestro, por la edziĝofesto de sinjoro Riketo kun la Tufo, kiu okazos morgaŭ. » La princino surpriziĝis sed ŝi ekmemoris ke, antaŭ unu jaro, en la sama tago, ŝi promesis fariĝi edzino de l'princo Riketo kun la

Tufo, ŝi pensis ke ŝi falas teren ĉe la rememoro de tiu promeso... Ŝi faris apenaŭ tridek paŝojn daŭrigante sian promenadon, kiam Riketo kun la Tufa sin prezentis al ŝi, brava, belega, kvazaŭ princo kiu baldaŭ edziĝos: « Vi min vidas, Sinjorino, diris li, fidele plenumi mian parolon, kaj mi tute ne dubas, vidante vin tie ĉi, ke vi tuj faros min la plej feliĉa el la homoj, donante vian manon al mi. — Mi konfesas al vi, sincere, respondis la princino, ke mi ne faris ankoraŭ decidon pri tio. Mi pensas ke mi ne povos ĝin fari tia, kia vi ĝin deziras. — Mi mirigas min, Sinjorino, diris Riketo kun la Tufo. — Ho, mi kredas, diris la bela princino, kaj certe se mi konus vin kiel brutulon, malspritulon, mi trovus min tre embarasata. Tia homo dirus al mi: Princino, mi havas vian promeson, estas necese ke vi fariĝu mia edzino; sed ĉar tiu al kiu mi parolas, estas viro la plej sprita en la mondo, li trovos racian kaj pravan mian singardecon. Vi scias ke estante malsprita mi ne povis tamen decidi min fariĝi via edzino, kiel nun kiam mi iĝis singardema pri la homoj, mi farus hodiaŭ tian decidon. Se vi pensis serioze edziĝi kun mi, vi estis malprava senigante min de mia malspriteco. — Se homo malsprita, respondis Riketo kun la Tufo, rajte povus, kiel vi ĵus diris, riproĉi vin pri la malplenumo de via parolo, kial vi volas, Sinjorino, ke mi same ne faru pri afero de kiu dependas la

tuta feliĉeco de mia vivo? Ĉu estus prave ke la personoj spritaj estu en pli malbona stato ol tiuj, kiuj ne havas spriton? Vi ne povas kredition. Sed ni venu al la persona fakto, mi vin petas. Volu diri al mi ĉu, krom mia malbéleco, io malplaĉas al vi en mi, ĉu mia naskiĝo, ĉu mia humoro kaj miaj manieroj? — Neniel, respondis la princino; mi amas en vi ĉion, kion vi ĵus diris. — Ĉar tiel estas, rediris Riketo, mi tuj estos feliĉa, vi povas fari min la plej aminda el la homoj. — Kiel tio povas fariĝi? diris al li la princino. — Tio fariĝos, diris Riketo, se vi min amas sufiĉe por voli ke tio estu. Por ke vi ne dubu, Sinjorino, sciiĝu ke la sama feino kiu, en la tago de mia naskiĝo faris donacon al mi povi fari sprita la personon kiun mi amos, tiu sama feino faris al vi la donacon povi fari bela tiun, kiu plaĉos al vi, tiun al kiu vi bone volos fari tian favoron. — Tiam, diris la princino, mi deziras tutkore ke vi fariĝu la plej aminda princo en la mondo, kaj mi faras al vi tiun donacon tiom, kiom mia povo ĝin permesas. »

Apenaŭ la princino elparolis tiujn vortojn kiam Riketo kun la Tufo aperis antaŭ ŝiaj ravitaj okuloj kiel la plej bela viro kiun ŝi iam vidis.


Kelkaj personoj malbonvolaj certigas ke ne nur la privilegioj de la feino faris tiun ŝanĝon sed ke la amo finis la metamorfozon. Kio ajn estu, la princino profunde meditis pri la persistado de



ŝia amanto, pri la diskreteco kaj pri ĉiuj la bonaj ecoj de lia animo, de lia koro; ŝi plu ne vidis la malbelformon de lia vizaĝo. Lia ĝibo ŝajnis al ŝi movo de viro klinita kaj submetita, liaj okuloj strabaj ŝajnis al ŝi brilantaj kaj ĉarmis ŝin, lia dika ruĝa nazo havis por ŝi ion da militista kaj heroa; kvankam li lamis terure, ŝi trovis al li belan mienon.

La princino promesis edziniĝi kun li, kaj li petis la konsenton de l'reĝo, sia patro. La reĝo eksciinte ke lia filino tre estimas Riketon kun la Tufo, kiun li konis kiel princon tre saĝan, kun plezuro akceptis lin kiel bofilon.

La morgaŭan tagon la edziĝofesto okazis, kiel Riketo antaŭdiris, kaj laŭ la ordonoj faritaj de li.



## LA MALGRANDA FINGRETO

---

Estis iam arbohakisto kaj arbohakistina kiuj havis sep infanojn, ĉiuj knaboj; la unuanaskita havis nur dek jarojn, kaj la plej juna nur sep. Oni miros ke ĉe ia arbohakisto naskiĝis tiom da infanoj en tiel mallonga tempo, sed lia edzino rapide laboris; du infanoj naskiĝis per unu fojo. Ili estis tre malriĉaj kaj iliaj sep infanoj multe ĝenis ilin, ĉar neniu el ili povis perlabori por sia vivo. Ili ankoraŭ ĉagreniĝis pri la pli juna kiu estis delikata kaj malmute parolis. Ili konsideris kiel malspriteco tion, kio provis la bonecon de lia spirito. Li estis tre malgranda, kiam li naskiĝis li ne estis preskaŭ pli dika ol fingro, tial oni nomis lin: *La malgranda Fingreto*. Tiu kompatinda infano estis la suferulo dome, kaj ĉiam li estis malprava. Tamen se li malmute parolis, li multe aŭskultis.

Tre malbona jaro venis, la malsato fariĝis tiel

forta ke tiuj malfeliĉaj personoj decidis liberigi sin de siaj infanoj. Vespere kiam tiuj infanoj jam kuŝis, la gearbohakistoj sidis, apud la fajro, kaj disputis. Kun koro premita de doloro, la viro diris : « Vi bone vidas ke ni plu ne povas nutri niajn infanojn ; mi ne povus ilin vidi mortintajn de malsato, antaŭ miaj okuloj, kaj mi decidis forkonduki ilin en la arbaron, morgaŭ, por ilin perdi Tio estos facila, ĉar dum ili sin amuzos per farado de branĉaroj, ni forkuros, ne vidita. — Ha ! ekkriis la virino, ĉu vi povus forĵeti vi mem viajn infanojn ? » La edzo prezentis al ŝi vane ilian grandegan malriĉecon, ŝi ne povis tion konsenti ; ŝi estas malriĉa sed ŝi estas ilia patrino. Tamen, konsiderinte kiel nesuferabla doloro estus vidi ilin morti de malsato, ŝi konsentis kaj kuŝiĝis plorante.

La malgranda Fingreto ĉion aŭdis kion ili diris, ĉar aŭdinte el sia lito ke ili parolas pri seriozaj aferoj, li sin levis kaj glitis senbrue sub la skabelon de sia patro, por ilin aŭskulti nevidata. Li rekuŝiĝis, sed ne dormis en tiu nokto, pripensante kion li devos fari. Frue matene, li leviĝis kaj iris al la bordo de rivereto, kie li plenigis, per blankaj ŝtonetoj, siajn poŝojn kaj poste revenis domon.

Oni foriris, la malgranda Fingreto nenion diris al siaj fratoj. Oni kondukis ilin ĉiujn en arbaron tiel densan, ke oni sin ne vidis unu la alian,

interspace de dek paŝoj. La arbohakisto ekhakis lignon kaj liaj infanoj ekkolektis vergaĵojn por fari branĉarojn. La gepatroj, vidante ilin okupitajn, malproksimiĝis iomete kaj poste forkuris tra flanka vojeto.

Kiam tiuj infanoj sin vidis solaj, ili ekkriis kaj ekploris per la tuta forto. La malgranda Fingreto lasis ilin kii, sciante bone tra kia vojo, ili revenos domon; ĉar marŝante, li ĵetis sur la vojon la blankajn ŝtonetojn kiuj estis en liaj poŝoj. Li, do, diris al ili: « Timu nenion, miaj fratoj, niaj gepatroj lasis nin tie ĉi sed mi vin rekondukos hejmen, nur, sekvu min. » Ili sekvis lin kaj li kondukis ilin ĝis ilia domo per la sama vojo tra kiu ili venis en la arbaron.

Komence ili ne kuraĝis enpaŝi, sed ili sin metis ĉiuj apud la pordo por aŭskulti ĉion, kion diros iliaj gepatroj.

En la momento kiam la gearbohakistoj revenis domon, la sinjoro de l'vilaĝo sendis al ili dek monerojn kiujn li ŝuldis al ili de longe kaj kiujn ili plu ne esperis ricevi. Tio redonis al ili la vivon, ĉar la malfeliĉuloj estis mortantaj de malsato. La arbohakisto tuj sendis sian edzinon al la buĉejo, ĉar jam de longe ili ne manĝis viandon. Ŝi aĉetis trifoje pli da viando ol estis necese por la vespermanĝo de du personoj, kiam ili estis sataj, la virino diris: « Ho ve! kie estas nun miaj karaj infanoj? plezure ili manĝus tion, kio

restas tie. Vi, Vilhelmo, decidis forĵeti ilin, mi diris al vi jam, ke vi pentos pri tio. Kion ili faras nun en la arbaro ; vi estis nehoma forĵetante tiel viajn infanojn. Ho ve ! mia Dio, eble, la lupoj ilin jam manĝis. » La arbohakisto fine malpacienĉigis, ĉar ŝi ĝin rediris pli ol dudek fojojn ke li pentos pri tio. Li minacis bati ŝin se ŝi ne silentus, li sendube havis tiom da ĉagreno kiom lia edzino kaj ŝi rompis al li la kapon per siaj plendoj. Li pensis, kiel la homoj kiuj tre amas la virinojn saĝajn kiuj saĝe parolas, sed trovas ĝenaj tiujn, kiuj parolas ĉiam bone.

La arbohakistino ploregis dirante . « Ho ve ! kie estas nun miaj karaj infanoj ? » Ŝi diris tion unu fojon tiel laŭte, ke la infanoj kiuj estis apud la pordo, aŭdinte ŝin, ekkriis ĉiuj kune : « Jen ni estas ! jen ni estas ! » Ŝi kuris rapide malfermi la pordon, kaj diris, kisante ilin : « Plezurego estas por mi, revidi vin, karaj infanoj, vi estas sendube tre lacaj kaj vi malsatas. Ho ! Peĉjo, kiel vi estas kotumita ! venu por ke mi purigu vin. » Tiu Peĉjo estis la unuanaskita, ŝi tre amegis lin ĉar li estis iom flavruĝeta kiel ŝi estis flavruĝa. Ili sin metis al la tablo kaj manĝis kun apetito. La gepatroj ĝojis, la infanoj rakontis sian teruron en la arbaro, ili parolis preskaŭ ĉiam kune. Tiuj bonaj personoj estis feliĉaj revidante siajn infanojn, sed tiu ĝojo daŭris tiom kiom la dek frankoj daŭris ; kiam la mono estis elspezita, ili ree-

falis en sian unuan ĉagrenon, kaj decidis forlasi la infanojn denove, pli malproksime ol la unuan fojon.

Ili ne povis paroli pri tio, sufiĉe sekrete, por ke la malgranda Fingreto ne aŭdu ilin. Li kredis ke li bone sukcesos kiel la unuan fojon, li leviĝis frue matene por serĉi ŝtonetojn, sed li ne povis ĉar la pordo estis duoble ŝlosita. Li pripensis kion fari, kiam la patrino donis pecon da pano al ĉiu por la matenmanĝo, li subite konsideris ke li povos uzi sian panon anstataŭ ŝtonetoj, dispecigante ĝin tra la vojo kaj li ĝin metis en sian poŝon.

La gepatroj ilin kondukis en lokon la plej densan kaj la plej malhelan de la arbaro, kiam ili estis tie, la gepatroj foriris per malgranda vojeto kaj lasis ilin.

La malgranda Fingreto ne ĉagreniĝis multe pri tio, li kredis ke li facile retrovos sian vojon per la pecetoj de sia pano, kiujn li dissemis ĉien, kie li pasis. Li tre surpriziĝis ne povante trovi eĉ unu paneron. La birdoj venis kaj manĝis ĉion. Jen, do, ili malĝojiĝis, ĉar ju pli ili vagis, des pli ili interniĝis en la arbaron. La nokto venis kaj ekblovis ventego kiu teruregis ilin. Ŝajnis al ili ke ili aŭdas la blekegojn de l'lupeoj el ĉiuj flankoj, kiuj venis por manĝi ilin. Ili preskaŭ ne kuraĝis paroli inter si, nek turni la kapon. Pluvego venis kiu penetris ilin ĝis la ostoj; ili glitis,

falis en la koton kaj sin relevis tute kotaj, ne scianta kie purigi siajn malpurajn manojn. La malgranda Fingreto supreniris arbon, esperante ke li eltrovos ion ; turninte la kapon flanken, li vidis lumeton kvazaŭ kandelo, tre malproksime, trans la arbaro. Li malsupreniris kaj plu vidis nenion, tamen marŝinte kelkan tempon kun siaj fratoj, li ekvidis la lumeton ; ili fine alvenis al la domo kie estis tiu kandelo, ne sen multaj teruroj, ĉar ofte ili ĉesis vidi ĝin tiam, kiam ili malsupreniris en ian kavon. Ili frapis la pordon, bona virino malfermis, ŝi demandis kion ili volas. La malgranda Fingreto diris al ŝi : « Ni estas malfeliĉaj infanoj perditaj en arbaro, ni petas vin, ke vi donu al ni almoze kuŝejon. » Tiu virino vidante ilin tiel beletaj, ekploris kaj diris : « Ho ve ! kompatindaj infanoj, kien vi venis ? Ĉu vi do ne scias, ke ĝi estas la domo de Lupohomo kiu manĝas la infanetojn ? — Ho ve ! sinjorino, respondis la malgranda Fingreto, kiu tremis fortege kiel liaj fratoj, kion ni faros ? estas certe ke la lupoj manĝos nin dum la nokto, se vi ne havos la bonecon loĝigi nin ĉe vi, tial ni preferas vere ke via sinjoro manĝu nin ; li kompatos eble, se vi volas petegi lin pri ni. » La edzino de Lupohomo esperis ke ŝi povos ilin kaŝi ĝis la morgaŭa mateno, ŝi lasis ilin eniri kaj ilin kondukis varmigi sin apud bona fajro, ĉar antaŭ la fajro estis rostilo kun ŝafo por la manĝado de l'Lupo-

homo. Kiam ili estis varmiĝintaj, ili aŭdis frapi tri aŭ kvar grandajn batojn ĉe la pordo, ĝi estis la Lupohomo kiu revenis. Tuj lia edzino kaŝis la infanojn sub lito kaj iris malfermi la pordon. Unue la Lupohomo demandis, ĉu la manĝo estas preta, ĉu oni enverŝis vinon? Kaj li sin metis al la tablo; kvankam la ŝafo estis ankoraŭ plena je sango, ĝi ŝajnis al li nur des pli bona. Tamen li flaris dekstren kaj maldekstren, dirante ke li sentas la odoron de freŝa viando. « Vi estas sendube, diris lia edzino, tiu bovido, kiun mi ĵus preparis kaj kies odoron vi sentas. — Mi sentas la odoron de freŝa karno, li diris, trarigardante sian edzinon, mi sentas ion, kion mi ne vidas. » Dirante tiujn vortojn, li sin levis kaj iris rekte al la lito. « Ho, li diris, jen do kiel vi volas trompi min, malbenita virino! mi ne scias kial mi ne manĝas vin ankaŭ; vi estas feliĉa ke vi estas maljuna besto. Ha! jen ĉasaĵo kiu venas al mi ĝustatempe por nutri tri Lupohomojn, miajn amikojn, kiuj devas viziti min en tiuj ĉi tagoj. » Li eltiris la infanojn unu post alia, ili falis genue teren, petante de li indulgon, sed li estis la plej kruela el ĉiuj Lupohomoj. Anstataŭ kortuŝiĝi, li manĝegis ilin per la okuloj, li diris al sia edzino ke ili estos frandaĵoj kiam ŝi faros bonan saŭcon al ili. Li prenis tranĉilegon, li ĝin akriĝis sur longa akriĝilo, jam, li kaptis unu, kiam lia edzino diris: « Kion vi faras nun? ĉu vi ne havas sufiĉe



da tempo morgaŭ ? — Silentu ! diris la Lupohomo, ili estos pli bonaj se oni ilin mortigos antaŭ ol prepari. — Sed vi havas ankoraŭ tiom da viando, rediris la bona virino ; jen bovido, du ŝafoj kaj duonon da porko. — Vi estas prava, diris la Lupohomo, donu al ili bonan manĝon por ke ili ne malgrasiĝu kaj kusiĝu ilin. » La bona virino ĝojegis kaj donis al ili bonajn manĝaĵojn, sed ili ne povis manĝi, tiom ili estis teruritaj.

La Lupohomo rekomencis trinki, ĝoja li estis, pensante ke li povos regalegi siajn amikojn, li malplenigis sian glason dekduon da fojoj pli ol kutime, li ebriiĝis iom kaj li devis kuŝiĝi.

Tiu Lupohomo havis sep filinojn tre junajn. Tiuj lupohominoj havis ĉiuj tre koloran vizaĝon, ĉar ili manĝis freŝan viandon, kiel ilia patro, sed ili havis rondajn kaj grizajn okuletojn, kurban nazon kaj grandegan buŝon kun longaj kaj akraj dentoj malproksimaj unu de alia. Ili ne estis tro malbonaj ankoraŭ, sed multe promesis, ĉar ili jam mordadis la infanetojn por suĉi ilian sangon. Ili kuŝis ĉiuj en granda lito, havante ĉiu kronon sur sia kapo. En la sama ĉambro estis alia lito sammezure, la edzino de la Lupohomo kuŝigis tien la sep knabetojn, kaj post tio ŝi kuŝiĝis apud sia edzo.

La malgranda Fingreto rimarkis ke la filinoj de l'Lupohomo havis orajn kronojn sur la kapo. Li timis ke la Lupohomo pentos ke li ne buĉis la

infanojn, la saman vesperon; li leviĝis nokte, prenis sian kufon kaj la kufojn de siaj fratoj, li iris senbrue meti ilin sur la kapojn de la sep filinoj de la Lupohomo, demetante iliajn kronojn kaj metante ilin sur la kapojn de siaj fratoj kaj sur la sian por ke la Lupohomo pensu ke ili estas liaj filinoj, kaj prenu siajn filinojn por la knabetoj kiujn li volis mortigi.

La afero bone sukcesis, kiam la Lupohomo vekigis noktomeze, li bedaŭris ke li prokrastis ĝis la sekvanta tago tion, kion li povis fari la hieraŭan tagon. Subite li sin ĵetis el la lito, kaj prenis sian tranĉilegon: « Mi iru vidi, li diris, kiel fartas niaj bubetoj, ni ne ŝanceliĝu. » Li supreniris palpante al la ĉambro de siaj filinoj, li proksimiĝis al la lito kie estis la knabetoj, kiuj dormis ĉiuj, krom la malgranda Fingreto. Tiu ĉi havis grandan teruron kiam li sentis la manon de la Lupohomo kiu palpis lian kapon kiel ankaŭ la kapojn de liaj fratoj. La Lupohomo sentis la orajn kronojn, kaj diris: « Vere, mi tuj farus belan laboron, mi vidas bone ke mi tro trinkis hieraŭ vespere. » Li iris al la lito de siaj filinoj, li tuŝis la kufojn de la knabetoj: « Ha! li diris, jen ili estas, ni laboru kuraĝe. » Dirante tiujn vortojn, li tranĉis senbalanciĝe la gorgon al siaj sep filinoj. Treege kontenta pri tiu bela ago, li iris rekuŝiĝi apud sia edzino.

Tuj kiam la malgranda Fingreto aŭdis ke la

Lupohomo ronkas, li vekis siajn fratojn, kaj diris al ili : « Vestu vin rapide kaj sekvu min. » Ili malsupreniris senbrue en la ĝardenon kaj saltis trans la murojn. Ili kuris dum preskaŭ la tuta nokto, ĉiam tremante kaj ne sciante kien ili iros.

La Lupohomo vekigis kaj diris al sia edzino : « Iru supren vesti la knabojn de hieraŭ vespere. » Lia edzino miris pri la boneco de sia edzo, tute ne komprenante kiamaniere li volis ke ŝi vestu ilin. Ŝi supreniris kaj surprizigis kiam ŝi ekvidis siajn sep filinojn buĉitaj kaj banantaj sin en malfluida sango. Ŝi svenis.

La Lupohomo timis ke lia edzino pasigas tro longan tempon por fari laboron kiun li ĵus ordonis al ŝi, li supreniris por helpi ŝin. Li ekmiris tiom same kiel lia edzino, vidante tiun teruran vidaĵon : « Ho ! kion mi faris ? ekkriis li Ha ! petoluloj ! vi tion pagos al mi kaj tuj. » Li verŝis plenpoton da akvo sur la vizaĝon de sia edzino, kaj kiam ŝi rekonsciiĝis, li diris al ŝi : « Donu al mi miajn botojn de sep mejloj por ke mi kaptu ilin. » Li foriris en la kamparon, kaj kurinte ĉiufanken li eniris fine en la vojon kie marŝis la malfeliĉaj infanoj, ili estis nur cent paŝojn de la domo de ilia patro. Ili vidis la Lupohomon kiu paŝegis de monto al monto kaj transiris riverojn tiel facile kiel mallarĝan rivereton. Fine la malgranda Fingreto vidis kavan ŝtonegon, li kaŝis siajn ses fratojn, kaj sin metis tien ankaŭ, rigar-

dante ĉiam kion la Lupohomo faros. Tiu ĉi sentis sin tre laca pro la longa marŝado kiun li estis farinta vane (ĉar la botoj de sep mejloj tre lacigas la homon kiu ĝin portas) kaj li volis ripozi.

Okaze, li sidiĝis sur la ŝtonegon kie la knaboj estis kaŝitaj. Li estis tre laca, li plu ne povis marŝi, li ekdormis, kaj ekronkis tiel brue ke la infanoj teruriĝis, ĉar li tenis ankoraŭ sian tranĉilegon por mortigi ilin.

La malgranda Fingreto timis malpli ol liaj frattoj, li diris al ili : « Vi forkuru rapide domon dum la Lupohomo dormas, lasu min tie ĉi, vi timu nenion. » Ili forkuris kaj rapide atingis la domon. La malgranda Fingreto alproksimiĝis al la Lupohomo, li detiris dolĉe liajn botojn kaj tuj metis ilin sur siajn piedojn. La botoj estis tre grandaj kaj larĝaj, sed, ĉar ili estis feinoj, ili povis pli-grandiĝi aŭ malpligrandiĝi laŭ la kruro de tiu kiu ilin metis sur sin, tiamaniere ili fariĝis ĝustaj por liaj piedoj kaj liaj kruroj, kiel se ili estus faritaj por li.

Li iris rekte al la domo de la Lupohomo, kie li trovis lian edzinon plorantan apud siaj buĉitaj filinoj : « Via edzo estas en granda danĝero, diris la malgranda Fingreto, ĉar li estas kaptita de bando da rabistoj kiuj ĵuris mortigi lin, se li ne donos al ili sian tutan monon. En la momento kiam ili tenis la ponardon sur lia gorgo, li ekvidis min kaj min petis ke mi venu sciigi al vi la staton

en kiu li sin trovas, kaj ke mi diru al vi : « Donu » al mi ĉion, kion li posedas, retenante nenion, » ĉar alie, ili mortigos lin senkompato, ĉar la » tempo urĝas multe. » Li volis ke mi prenu liajn botojn de sep mejloj por rapidi, kaj ankaŭ por ke vi ne pensu ke mi estas mensoganto. » La bona virino terurita donis tuj al li ĉion, kion ŝi havis. Kvankam tiu Lupohomo manĝis infanojn, li estis tamen bona edzo.

La malgranda Fingreto ŝargata de la riĉeco de la Lupohomo revenis al la loĝejo de sia patro, kie li estis ricevita kun granda ĝojo.

Kelkaj personoj ne konsentas inter si pri tiu fakto, kaj certigas ke la malgranda Fingreto ne priŝtelis la Lupohomon ; li prenis la botojn de sep mejloj nur, ĉar la Lupohomo uzis ilin por kapti la infanetojn. Tiuj personoj certigas ke ili scias tion precize, ĉar ili trinkis kaj manĝis en la domo de la arbohakisto.


La malgranda Fingreto kun la piedoj vestitaj per la botoj de la Lupohomo, iris al la kortego fari servon al la reĝo, kiu ĉagrenis sin pro la militistaro, kiu estis du cent mejlojn de tie, li ne sciis la sukceson de la granda batalo kiu estis farita. Malgranda Fingreto proponis al la reĝo alporti al li novaĵojn de la militistaro antaŭ la fino de l'tago, la reĝo promesis al li sumegon da mono se li bone sukcesis. La malgranda Fingreto alportis la novaĵojn vespere : tiu unua

kurado konatigis lin, li akiris ĉion, kion li volis. La reĝo multe pagis al li por ke li portu liajn ordonojn al la militistaro. Multaj sinjorinoj donis al li multe da arĝento por ke li portu iliajn novaĵojn al iliaj amikoj ; kelkaj edzinoj donis al li leterojn por siaj edzoj.

Plenuminte dum kelka tempo la metion de kuriero, li akiris multe da mono kaj tiam, li revenis al sia patro, kie estas neeble imagi kun kia ĝojo oni ricevis lin.

Li riĉigis sian familion, li aĉetis oficojn nove kreitajn por sia patro kaj siaj fratoj, li donis al ĉiu el ili belan situacion, kaj samtempe li amindumis al la reĝo perfekte bone.





## FELO DE AZENO

---

Estis iam reĝo tiel granda, tiel amata de siaj popoloj, tiel respektata de ĉiuj siaj najbaroj kaj liganoj, ke oni povis diri ke li estas la plej feliĉa el la monarĥoj. Lia feliĉo ankoraŭ firmiĝis per tio ke li elektis al si principinon tiel belan kiel virtan ; tiuj feliĉaj geedzoj vivis en perfekta harmonio. El ilia edzeco naskiĝis filino dotita de tiom da ĉarmoj kaj de amindeco, ke ili ne deziris plu havi grandnombran familion.

La riĉeco, la gusto, la sufiĉego regis en ilia palaco ; la ministroj estis saĝaj kaj lertuloj, la korteganoj virtaj kaj sindonaj, la servistoj estis fidelaj kaj laboremaj. La ĉevalejoj vastaj kaj plenaj je la plej belaj ĉevaloj de la mondo, kovritaj per riĉaj jungaĵoj. Sed, tio kio mirigis la fremduojn kiuj venis admiri ilin, tio estis ke, en la plej videbla loko, unu majstro azeno montris siajn longajn kaj grandajn orelojn. Ne fantazie, sed



prave, la reĝo donis al ĝi apartan lokon. La kvalitoj de tiu ĉi neordinara besto meritis tiun favoron, ĝia naturo estis eksterordinara, ĉar ĝia kuŝejo estis kovrita ĉiumatene, ne per malpuraĵo, sed per sufiĉego da belaj oraj moneroj, kiujn oni kolektis post ĝia vekigo.

Tamen, ĉar la sorto dissemas egale siajn bonajn kaj malbonajn ŝancojn sur la regatojn kiel sur la reĝojn, ĉiam venas ke la bonoj almiksiĝas kelka malfeliĉo : la ĉielo volis ke la reĝino subite malsaniĝu. Nek la scienco, nek la lerteco de la kuracistoj povis trovi ian rimedon. Ĉagrenego fariĝis ĝenerala. La reĝo sentema kaj amema (malgraŭ la fama proverbo laŭ kiu edzeco estas la tombo de l'amo) malĝojegis malmodere. Li faris fervorajn religiajn promesojn al ĉiuj preĝejoj de sia reĝolando, li oferis sian vivon anstataŭ la vivo de sia kara edzino, li alvokis vane la diojn kaj la feinojn. La reĝino sentis proksimiĝi sian lastan horon, ŝi diris al la princo, sia edzo, kiu ploregis :

« Permesu, ke antaŭ ol morti, mi postulu ion de vi : se vi deziros reedziĝi... » Ĉe tiuj vortoj la reĝo faris kompatindajn kriegojn, li premis la manojn de sia edzino, banis ilin per larmoj, certigante ŝin, ke estas neutile paroli al li pri dua edziĝo :

« Ne, ne, li diris, diru pli bone, ke mi sekvu vin. — La regno, diris la reĝino, kun persisteco

kiu pligrandigis la bedaŭron de l'princo, la regno rajte postulos posteulojn, kaj ĉar mi donis al vi nur unu filinon, ĝi devos rapidigi vin, ke vi donu al viaj popoloj, filojn similajn al vi, do, mi vin petegas, pro la amo kiun vi havas por mi, ke vi cedu al la intencoj de viaj popoloj nur tiam kiam vi trovos princinon pli belan ol mi; pri tio, mi volas vian ĵuron, kaj kontenta, mi mortos. »

Oni pensas ke la reĝino kiu tre alte ŝatis sin mem, postulis tiun ĵuron opiniante ke neniam virino povos egali ŝin per beleco, sekve la reĝo neniam reedziĝos. Fine, ŝi mortis, la reĝo ploris tage kaj nokte, lia malespero bruegis, li sin okupis nur je sia vidveco.

La grandaj doloroj ne longe daŭras; aliparte la eminentuloj de la regno kuniĝis kaj petis la reĝon ke li reedziĝu. Tiu propono ŝajnis al li nehumana kaj li disverŝis novajn larmojn, li citis la ĵuron faritan al la reĝino, certigante siajn konsilantojn pri la neebleco trovi princinon pli belan ol lia mortinta edzino. Sed la konsilantaro trovis ke tiu promeso estas bagatelo, ĝi diris ke la beleco estas neutila; sufiĉe estas ke la reĝino estu virta kaj fruktoporta. La konsilantoj diris ankoraŭ ke la regno petas principojn por ĝia ripozo kaj trankvileco, ke la juna princino havanta jam ĉiujn bonajn ecojn por fariĝi granda reĝino, povus edziniĝi baldaŭ; tiam se ŝi elektus fremdulon, li forkondukus kun si la princinon,

aŭ se li reĝus kun ŝi, la infanoj naskitaj de ilia edzeco, ne estus el la sama sango, tiam la najbaraj popoloj povus komenci militon kiu ruinigos la reĝolandon.

La reĝo estis tuŝita de la evidenta pravenco de iliaj rezonadoj, li promesis kontentigi siajn fidelajn regatojn.

Efektive, li serĉis inter la princinoj edzinigeblaj, tian kiu taŭgus por li. Ĉiutage, oni alportis al li ĉarmajn portretojn, sed, ho ve ! nenia havis en liaj okuloj, la belmovojn de lia mortinta edzino ; tial li sin ne decidis.

Bedaŭrinde, fariĝis ke li trovis la princidinon, sian filinon, ankoraŭ pli bela, pli ĉarma ol la reĝino, pli sprita kaj pli agrabla. La freŝeco de ŝia rozokolora vizaĝo flamigis la reĝon tiel forte, ke li ne povis kaŝi sian amon al la princino. Li diris al ŝi, ke li decidis edziĝi kun ŝi, ĉar ŝi estis la sola persono kiu povos malligi lin de lia ĵuro.

La juna princino estis virta kaj svenis preskaŭ aŭdante tiun abomenan proponon. Ŝi sin ĵetis al la piedoj de l'reĝo sia patro kaj lin petegis ke li ne trudu al ŝi tian krimon.

La reĝo metis al si tiun strangan projekton en la kapon, li konsiliĝis kun maljuna Druido por neniigi la timojn de konscienco de la princino. Tiu Druido pli ambicia ol religia, preferis la honoron esti konfidato de l'princo al la devo esti defendanto de la virta ĉasteco. Tiu lertulo

penetris en la spiriton de l'reĝo, kai lin kvietigis pri la krimo kiun li tuj faros, li konvinkis la reĝon ke li faros pian agon edziĝante kun sia filino kaj ne gravan kulpon. La reĝo estis flatita de la paroloj de tiu krimulo, li kisis lin, kaj revenis en la palacon, pli obstina ol iam pri sia projekto, kaj sendis al la princino ordonon prepari sin.

La juna princino sentis vivan doloron, kaj decidis konfidi sian malĝojon al sia baptopatrino, la feino de l'Siringoj. Tial ŝi foriris la saman nokton en beleta veturileto, jungita per ŝafego kiu konis ĉiujn vojojn. Ŝi alvenis tien feliĉe. La feino amis la princinon kaj diris al ŝi :

« Mi bone scias tion, kio alkondukas vin al mi, timu neniel, se vi fidele obeos miajn konsilojn, nenio povas malutili al vi, ĉar, mia kara infano, tio estus granda kulpo edziniĝi kun via patro, sed ne kontraŭdirante al li, vi povos eviti tion. Diru al li, ke, por plenumi lian deziron, estas necese ke li donu al vi robon koloritan kiel la vetero ; kia ajn estas lia amo kaj potenco, li ne povos kontenti vian volon. »

La juna princino tre dankis sian baptopatrinon kaj reiris la palacon.

La morgaŭan tagon matene, ŝi diris al la reĝo, ke ŝi volus robon koloritan kiel la vetero antaŭ ol fari al li ian konfidon. La reĝo ravita de l'espero kiun ŝi donis, kunvokis la plej kapablajn

laboristojn kaj ordonis al ili, ke ili faru tiun robon, kondiĉe ke, se ili ne sukcesos, ili estos pendigitaj ĉiuj. La duan tagon ili alportis la deziratan robon, oni sternis ĝin. Pli bela ĝi estis ol la ĉielo ĉirkaŭita de oraj nuboj. La princino malĝojiĝis, ĉar la reĝo petis ŝin rapidi sian respon- don. La princino kuris denove al sia baptopa- trino kiu ekmiregis : « Petu, ŝi diris, robon koloritan kiel la luno. » La reĝo kiu volis nenion rifuzi al ŝi, sendis serĉi la plej famajn laboris- tojn kaj ordonis al ili, plej rapide kiel eble pre- tigi robon lunkoloran.

Post dudek-kvar horoj, ili alportis la belegan robon. La princino estis ravita de tiu robo, multe pli ol de la bonzorgoj de l'reĝo, ŝi plimal- ĝojiĝis ankoraŭ, ŝi ploregis kun sia nutristino kaj siaj servistinoj.

La feino de l'Siringoj sciis tion kaj venis al la helpo de la princino malĝojigita. Ŝi diris : « Petu, tiun fojon, robon koloritan kiel la suno. Al la reĝo ĝi tedos, ĉar, neniam, oni povos fari tian robon, kaj en ĉia okazo ni gajnos tempon por pripensi. »

La princino petis la robon kaj la amanta reĝo donis, sen bedaŭro, ĉiujn la diamantojn kaj rubenojn de sia krono por ornami tiun belegan ellaboraĵon. Li ordonis ke la laboristoj nenion ŝparu, por fari tiun robon simila al la suno. Tial, kiam ĝi estis sternita sur la kanapo, ĉiuj kiuj

vidis ĝin, permes la okulojn, ili estis blindigitaj de ĝia brila lumo. (De tiu tempo datumas la bluaj okulvitroj kaj la nigraj vitroj). La princino surpriziĝis ĉe tiu vido : neniam oni vidis ion tiel belan kaj tiel arte laboritan. Ŝi konfuziĝis kaj eliris en sian ĉambron, kie la feino ŝin atendis, tiu ĉi ruĝiĝis de kolero :

« Ho, mia filino, ŝi diris al la princino, aŭ mi tre eraras aŭ mi estas konvinkita ke ni tuj suferigos teruran provon al la malinda amo de via patro ; li obsinas pri tiu edziĝo, sed mi pensas ke vi surprizigos lin, petante la felon de tiu ŝatinda azeno, kiun li amas pasie, kaj kiu liveras larĝe al li, liajn elspezojn. »

La princino kredis ke vere estas trovita rimedo por eviti tiun malaman edzecon, ŝi pensis ke neniam ŝia patro povos oferi sian azenon.

Ŝi esprimis sian deziron pri la felo de tiu ŝatita besto. La reĝo tre miregis pri tiu fantazio, tamen, li ne ŝanceliĝis kontentigi ŝin. La malfeliĉa azeno estis oferita kaj ĝia felo, amindume alportita al la princino. Ŝi plu ne vidis rimedon por malhelpi sian malfeliĉon, ŝi malesperis ; tiam alkuris ŝia baptopatrino : « Kion vi faras ? mia filino, ŝi diris vidante la princinon kiu ŝiris siajn harojn kaj kontuzis siajn belajn vangojn. Jen estas la plej feliĉa momento el via vivo. Kovru vin per tiu felo, eliru el tiu ĉi palaco, kaj iru tiel longe kiel la tero povos porti vin : kiam oni suferas por

la virto, la dioj vin rekompencas. Iru, mi zorgos ke via tualetto sekvu vin ĉien ; kie ajn vi haltos, via kesto kiu enhavas viajn vestojn kaj viajn juvelojn, sekvos viajn paŝojn sube tere. Jen mia vergo ; ekfrapu la teron kiam vi bezonos ion el tiu kesto, kaj la kesto aperos antaŭ viaj okuloj ; sed rapidu, foriru ne malfruante. » La princino kisis milfoje sian baptopatrinon, petis ŝin ne forgesi ŝin, sin vestis per tiu malbela felo kaj eliris el la palaco, rekonita de neniuj.

La foresto de la princino kaŭzis grandan bruon. La reĝo malesperis, li estis pretiginta belegan feston, li fariĝis nekonsolebla. La dissendis pli ol cent ĝendarmojn kaj pli ol mil mosketistojn por persekuti lian filinon, sed la feino, kiu ŝin protektis, faris ŝin nevidebla al la plej lertaj serĉadoj. Fine la reĝo konsoliĝis pri tio.

Dume la princino vojiris, ŝi iris malproksimen, tre malproksimen, ankoraŭ pli malproksimen ; ĉie ŝi petis oficon, oni donis al ŝi almoze manĝaĵojn, sed oni trovis ŝin tiel malpura ke neniuj volis ŝin. Fine, ŝi eniris belan urbon kie troviĝis farmodomo ĉe la enira pordego. La farma mastro bezonis knabinon por lavi la viŝilojn, purigi la meleagrojn kaj la trogon de l'porkoj. Tiu virino vidante tiun vojaĝantinon tiel malpura, proponis al ŝi eniri en ŝian farmodomon por ke ŝi faru tiun laboron. La princino tutkore akceptis, tiom la longa marŝado lacigis ŝin.

Oni metis ŝin en malproksiman angulon en la kuirejo, kaj de la unuaj tagoj, ŝi estis la celo de la ŝercoj de la servistaro, ŝia felo de azeno faris sin malbelega kaj malbonodora. Fine oni kutimis al ŝi. Ŝi penis plenumi siajn devojn, tiel bone, ke la farma mastrino ekprotektis ŝin. Ŝi kondukis la ŝafojn, ŝi paŝtis la meleagrojn en paŝtejo tiel inteligente ke ĉio fruktodonis inter ŝiaj belaj manoj kiuj ŝajnis esti farintaj tion, la tutan sian vivon.

Jam, ŝi sidiĝis apud klara fonto, kie ŝi ploris ofte, bedaŭranta sian malĝojan staton, ŝi speguliĝis en la pura akvo, sed la malbela felo de azeno kiu ŝin kovris, teruris ŝin. Ŝi hontis pri tiu vestaĵo, kaj lavis sian vizaĝon kaj siajn manojn, kiuj fariĝis pli blankaj ol elefantosto : ŝia vizaĝo rozokolora reprenis sian naturan freŝecon. La ĝojo trovi sin tiel bela, donis al ŝi la deziron bani ŝin, tamen, estis necese remeti sur sin la malindan felon por reiri al la farmodomo.

La morgaŭa tago estis festotago ; ŝi havis tempon eltiri el sian keston kaj ordigi sian tualeton ; ŝi pudris siajn belajn harojn kaj sin vestis per sia bela robo veterkolora. Ŝia ĉambro estis tiel malgranda ke la vosto de tiu robo ne povis tie trovi spacon. La juna princino speguliĝis kaj admiris sin mem ; fine ŝi decidis, por ne enui sin, ke ŝi metos laŭvice siajn belajn robojn dum



la festoj kaj dimanĉoj : kaj ŝi faris tion ĝuste. Ŝi miksis florojn kaj diamantoj en siaj haroj per admirinda arto, kaj ofte ŝi sopiris, ĉar ŝi havis por admiri ŝian belecon nur siajn ŝafojn kaj meleagrojn, kiuj ŝin amis eĉ kun ŝia terura felo de azeno, kies nomon oni donis al ŝi en la farmodomo.

En unu festotago, *Felo de Azeno* sin vestis per sia robo sunkolora ; la reĝido kiu estis bienulo de la farmodomo, venis tien por sin ripozi, revenante de ĉasado. Tiu princo estis juna, bela kaj admirinde eleganta, li estis tre amata de la reĝo kaj reĝino, siaj gepatroj, la popoloj adoris lin. Li faris kamparan manĝeton kaj poste li trakuris la birdokorton vizitante ĉiujn angulojn kaj kurante de loko al loko, li eniris en malhelan aleon, kie li vidis pordon fermitan. La scivolo puŝis lin kaj li metis okulon al la seruro. Sed, kion li vidis ? princinon, adorindan princinon, belegan kaj riĉege vestitan ; ŝia nobla sintenado kaj ŝia modesteco similigis ŝin al diino.

La princo sentis subite fervoregan amon por tiu ĉarma apero, li volus malfermi la pordon, sed la respekto lin retenis. Li penis eliri el tiu malhela aleo kaj rapidis informi sin, kiu estis la persono lokita en tiu ĉambreto. Oni respondis al li : « Ĝi estas la servistino nomata *Felo de Azeno*, pro la malpura felo kiu ŝin vestas. Oni prenis ŝin pro kompato sed neniu rigardas nek parolas al ŝi ; ŝi gardas la ŝafojn kaj la meleagrojn. »

La princo ne kontentiĝis de tiu klarigo ; li vidis bone, ke tiuj maldelikatuloj sciis nenion plue, tiam li trovis neutila daŭrigi siajn demandojn.

La princo revenis en la palaco de l'reĝo, sia patro, pli enamigita ol oni povas diri, havante senĉese antaŭ la okuloj, la belan figuron de tiu diaĵo, kiun li vidis tra la truo de la seruro. Li bedaŭris ke li ne frapis la pordon kaj li promesis al si, ĝin fari alifoje. Tamen, li sin turmentegis kaj malsaniĝis per terura febro, kiu ekkaptis lin en la sama nokto. La reĝino lia patrino, kiu havis nur tiun idon, malesperis ĉar la kuraciloj montriĝis senutilaj. Ŝi promesis vane la plej grandajn rekompencojn al la kuracistoj, ili uzis tutan sian arton, sed nenio resanigis la princon. Fine ili divenis ke mortiga ĉagreno kaŭzis tiun strangan malsanon, ili avertis la reĝinon pri tio. Tiu patrino plena je amo por sia filo, lin petegis, ke li diru al ŝi la kaŭzon de sia malsano, ŝi diris al li ke la reĝo lia patro forlasos la tronon se estos necese, kaj volonte donos al li la kronon, aŭ ke li diru ĉu ian princinon li deziras por edziĝi ; ŝi certigis lin, ke ambaŭ la gereĝoj mortus se li ne resaniĝus. La reĝino farante tiun kortuŝitan paroladon ploregis kaj banis la vizaĝon de l'princo per siaj larmoj.

« Sinjorino, li diris fine, per malforta voĉo, mi ne estas suface sendankema por deziri la kronon

de mia patro ; plaĉu al la ĉielo ke li vivu longajn jarojn kaj ke li permesu al mi, ke mi estu la plej fidela kaj la plej respektema el liaj regatoj ! Pri la princinoj kiujn vi proponas al mi, mi devas diri ke ankoraŭ mi ne pensis edziĝi, sed vi bone scias ke mi estas obeema al via volo, mi obeos ĉiam, kion ajn tio kostas al mi. — Ho ! mia filo, diris la reĝino, nenio povas esti por ni tro multekosta ol vian vivon, sed, mia karulo, mi vin petegas, ke vi diru sincere al mi tion, kion vi deziras : estu certa, ke ni konsentos pri ĉiuj viaj deziroj. — Nu, Sinjorino, diris la princo, mi riproĉus al mi se mi malkvietigus vin, mi vin obeas, ĉar vi volas scii mian malĝojon, mi estus krimulo se mi metus en danĝeron la vivon de miaj gepatroj ; mi deziras kukon faritan de Felo el Azeno ! »

La reĝino miris pro tiu stranga nomo kaj demandis, kiu estis tiu Felo de Azeno.

« Ŝi estas, Sinjorino, respondis unu oficiro, kiu okaze estis vidinta tiun knabinon, la plej malbela besto, krom la lupo. Ŝi estas speco de nigra felo malpurega, kiu loĝas en via farmodomo, kie ŝi gardas viajn meleagrojn. — Tio, nenion signifas, diris la reĝino, sendube, mia filo revenante de ĉaso, manĝis, eble, kukajon faritan de ŝi ; tio estas fantazio de malsanulo, nu, mi volas ke Felo de Azeno, ĉar Felo de Azeno si estas nomata, faru rapide kukon por li. »

Oni kuris al la farmodomo, oni venigis Felon

de Azeno, oni ordouis al ŝi fari, kiel eble plej bone, kukon por la princo.

Kelkaj verkintoj certigas ke, kiam la princo estis metinta la okulon al la seruro, Felo de Azeno ekvidis lin; tiam ŝi rigardis la elirantan princon per ŝia fenestreto. Ŝi trovis la princon tiel bela, tiel juna, tiel eleganta, ke ŝia koro ĝojiĝis kvankam tiu memoro iafoje kaŭzis al ŝi kelkajn ekĝemojn.

Kiel ajn estas pri tio, Felo de Azeno kiu aŭdis multe laŭdi tiun princon, estis feliĉa trovi rimedon por konatiĝi kun li. Ŝi enfermis sin en sia ĉambreto, deĵetis sian malbonodoran felon, lavis al ŝi la vizaĝon kaj la manojn, ŝi kombis siajn blondajn harojn, metis belan korseton faritan el brilanta arĝento, similan jupon kaj ekfaris la kukon tiom deziratan. Ŝi prenis la plej puran farunon, ovojn kaj freŝegan buteron. Vole aŭ nevole, laborante, ŝi lasis fali la ringon, kiun ŝi portis ĉirkaŭ la fingro, en la paston kaj enknedis ĝin. Tuj kiam la kuko estis bakita, ŝi metis sur sin sian malbelegan felon kaj alportis la kukon al la oficiro, demandante lin, ĉu la farto de l'princo fariĝis pli bona; sed, tiu homo ne volis respondi al ŝi, kaj kuris forpoti la kukon al la princo.

Avide la princo ĝin prenis el la manoj de tiu homo, kaj ĝin mangis tiel vive ke la kuracistoj diris ke tiu frenezo estas malbona signo. Efektive la princo sufokiĝis preskaŭ, pro la ringo, kiun li

trovis en peco de l'kuko, sed li eltiris ĝin lerte el sia buŝo, kaj lia fervoro manĝi la kukon malrapidiĝis, kiam li rigardis tiun delikatan smeraldon fiksitan sur ora junko kies rondo estis tiel mallarĝa, ke oni povis diri ke la ringo ĉirkaŭis la plej maldikan fingreton en la mondo. Li kisis milfoje tiun ringon, metis ĝin sub sian kusenon; li retiris ĝin ĉiufoje kiam li estis sola.

Li sin turmentis por elpensi per kia rimedo li povos vidi tiun al kiu apartenis la ringo; li ne povis pensi ke se li petos Felon de Azeno, oni konsentos, ke tiu filino venu; li ne kuraĝis diri tion, kion li estis vidinta tra la seruro, timante ke oni mokos lin, nomante lin fantaziulo. Li remalsaniĝis, la febro lin reatakis forte; la kuracistoj ne sciante kion fari, deklaris al la reĝino ke la princo malsanas de amo. La reĝino venis multfoje al la princo kun la reĝo kiu sin ĉagrenegis:

« Mia filo, kara filo mia, ekkriis la monarĥo malĝojigita, diru al mi la nomon de tiu, kiun vi amas, ni ĵuras ke ni ŝin donos al vi, eĉ se ŝi estus la plej humilega el la sklavinoj. »

La reĝino kisis lin, certigante la ĵuron de l'reĝo. La princo kortuŝita de la larmoj kaj karesoj de siaj gepatroj diris:

« Mi ne intencas edziĝi malplaĉante al vi, mia patro kaj mia patrino, mi ĝin volas pruvi al vi. Jen, smeraldo, li diris, tirante la ringon el sub la

kuseno, mi edziĝos kun tiu al kiu apartenas tiu ringo, kiu ajn ŝi estu. Mi pensas ke la posedantino de tiu bela fingreto ne povos esti maldelikatulino aŭ kampanino. »

La gereĝoj prenis la ringon, kurioze ĝin ekzamenis kaj opiniis ankaŭ ke tiu ringo apartenas nur al ia fraŭlino altranga.

Tiam la reĝo kisis sian filon, petante lin ke li trankviliĝu ; li eliris, li sonorigis la tamburojn, la flutojn kaj trumpetojn tra la tuta urbo ; la heroldoj kriis ke ĉiuj junulinoj estas allasitaj al la palaco por provi ringon, kaj tiu al kiu ĝi estos laŭmezura, edziniĝos kun la heredanto de l'trono.

Unue la princinoj alvenis, poste la dukinoj, la markizinoj kaj baroninoj, sed vane ili maldikigis siajn fingrojn, neniu el ili povis surmeti la ringon. Oni venis al la koketaj laboristinoj kiuj, kvankam ĉiuj beletaj, havis la fingrojn tro dikaj.

La princo fartis pli bone, li mem faris la provadon. Ĉe la fino oni venigis la ĉambristinoj, ili ne sukcesis. Tiam la princo ordonis ke oni alkonduku la kuiristinojn, la servistinojn, la gardistinojn de ŝafoj ; oni alkondukis ĉiujn, sed iliaj dikegaj ruĝaj fingroj kaj mallongaj eniris nur ĝis la ungo.

« Ĉu oni venigis tiun Felon de Azeno kiu faris kukon por mi, diris la princo. » Ĉiuj ekridis kaj oni diris, ke ŝi estas tro malpura : « Iru tuj serĉi ŝin, diris la reĝo, oni ne diru, ke mi esceptis

iun. » Oni kuris, ridante kaj mokante, serĉi la gardistinon.

La princino kiu estis aŭdinta la tamburojn kaj la alvokon de la heroldoj, komprenis ke ŝia ringo kaŭzis tiun bruegon; ŝi amis la princon, kaj, ĉar la vera amo estas timema, ŝi timis senĉese ke ia sinjorino havos fingron tiel maldikan kiel la ŝia. Ŝi ĝogis kiam oni frapis la pordon.

De la momento kiam ŝi eksciis, ke oni serĉas la fingron enirantan en ŝian ringon, ia certa espero igis ŝin frizi zorge la kapon kaj meti sur sin sian belan korseton kun sia jupo plena je falbaloj, el arĝentaj punktoj, plensemitaj de smeraldoj.

Tuj kiam ŝi aŭdis frapi la pordon kaj voki ŝin por veni al la princo, ŝi remetis sur sin rapide sian felon de azeno, kaj malfermis sian pordon.

Tiuj personoj, mokante, diris al ŝi ke la reĝo petis ŝin por edzinigi ŝin kun sia filo; poste, kun longaj ridegoj, ili kondukis ŝin al la princo.

Li miris pro la malbonega vesto de tiu knabino kaj ne kuraĝis kredi ke ŝi estas la sama, kiun li estis vidinta tiel luksa kaj tiel bela. Li malĝojiĝis kaj konfuziĝis, kaj malgaje li diris:

« Ĉu estas vi kiu loĝas en la fundo de tiu mal-luma aleo, en la tria birdokorto de la farmodomo? — Jes, Sinjoro, ŝi respondis. — Montru al mi vian manon, diris li, tremante kaj elspirante profundan ekĝemon. »

Ha! kiel fortege surprizitaj estis la gereĝoj, la

ĉambelanoj kaj la nobeloj de la kortego, kiam el sub tiu nigra felo, eliris maneto blanka, delikata, rozokolora. La ringo almezuriĝis senpene al la plej bela fingreto de la mondo.

Per gracia movo kiun faris la princino, la felo falis, ŝi aperis en tiel rava beleco, ke la princo kvankam malforta, sin metis al ŝiaj genuoj kaj ilin premis kun tia fervoro ke ŝi ruĝiĝis. Oni ne ekvidis tion preskaŭ, ĉar la gereĝoj kisis ŝin fortege kaj petis ŝin edziniĝi kun ilia filo.

La princino konfuziĝis pro la karesoj kiujn oni faris al ŝi, kaj pro la amo kiun atestis tiu bela juna princo. Ŝi dankis ilin tamen, kiam la plafono de la salono malfermiĝis. La helpema feino, la feino de l'Siringoj malsupreniris el veturilo farita per branĉoj kaj floroj de ŝia nomo, ŝi rakontis kun nekomparebla ĉarmo la historion de la princino. La gereĝoj kontentaj, ke Felo de Azeno estas granda princino duobligis siajn karesojn; sed la princo estis pli sentema al la virto de la princino kaj lia amo ankoraŭ pligrandiĝis.

La malpacienco de l'princo donis apenaŭ sufiĉan tempon por fari la konvenajn preparadojn por tiu feliĉa edziĝo. La gereĝoj ekamegis sian bofilinon, ili faris al ŝi multegon da karesoj, prenante ŝin en siajn brakojn. Tamen ŝi diris, ke ŝi ne povas edziniĝi sen la konsento de l'reĝo, ŝia patro. Oni sendis al li la unuan inviton, ne dirante al li kiu estas la estonta edzino. La feino de



l'Siringoj prezidis al ĉio, ŝi estis volinta tiel, pro la konsekvencoj.

Alvenis reĝoj el ĉiuj landoj, unuj portataj en seĝoj, aliaj en veturiletoj, la plej malproksimaj rajdantaj sur elefantoj, sur tigroj, sur agloj ; sed la plej belega kaj la plej potenca estis la patro de la princino, kiu feliĉe estis forgesinta sian nenaturan amon ; li edziĝis kun reĝino vidvino tre bela de kiu li havis nenian infanon.

La princino kuris antaŭ lin, tuj li rekonis ŝin kaj ŝin kisis kun granda amo antaŭ ol ŝi havis la tempon meti genuon teren. La gereĝoj presentis al li sian filon, kiun li superŝutis per amikaĵoj.

La edzigofesto estis farita kun neimagebla lukso. La junaj geedzoj, malmute sentemaj por tiuj luksaĵoj, vidis kaj rigardis nur sin reciproke.

La reĝo, patro de l'princo, kronis sian filon la saman tagon kaj kisant la manojn al li, lokis lin sur sian tronon, malgraŭ la kontraŭbatalo de tiu respektema filo ; sed li devis obei.

La festoj de tiu glora edziĝo daŭris proksimume tri monatojn ; sed la amo de tiuj geedzoj daŭrus ankoraŭ, tiom ili sin amis, se ili ne estus mortintaj cent jarojn poste.


FINO


## TABELO DE LA ENHAVO

---


La Blua-Barbo . . . . .	7
La Ruĝa-Ĉapeto . . . . .	15
La Belulino dormanta en Arbaro. . . . .	19
La Majstro Kato aŭ la Kato piedvestita per botoj . . . . .	31
Cindrulino aŭ la vitra Pantofleto. . . . .	37
Riketo kun la Tufo . . . . .	45
La malgranda Fingreto . . . . .	53
Felo de Azeno . . . . .	67

AB 1946









BUCHBINDEREI  
FELIX PROUZA  
NCHF. PETER GRÜNAUER  
1090 WIEN, BERGG. 4/1A  
TEL. 34 67 132